

xx

NOVA BIBLIOTEKO

xx

Nr.

ESPERANTO

2

Eldonata de: J. Glück kaj Dr. Sós

ŜOLANDRO

DE

WALDEMAR BONSELS

Tradukis dr-o Edmund Sós



WIEN

VERLAG PAUL KNEPLER

(Wallishausser'sche Buchhandlung)


I., LICHTENSTEG 1

ŜOLANDRO

DE

WALDEMAR BONSELS

TRADUKIS DRO. EDMUND SÓS



WIEN

VERLAG PAUL KNEPLER

(WALLISHAUSER'SCHE BUCHHANDLUNG)

I., LICHTENSTEG 1



82-3

821.112.2-3=922

Alle Rechte vorbehalten.



Antaŭparolo.

Waldemar Bonsels estas unu el la plej famaj kaj plej ŝatataj germanaj aŭtoroj de la nuntempo. La literaturaj verkoj de Bonsels estas disvastigataj en multaj centmiloj da ekzempleroj. La libro „Menschenwege“ *) (homaj vojoj) el kiu mi elektis unu el la plej interesaj karakterstudoj, atingis jam la eldonciferon de ducentmil.

Mi tre ĝojas esti ricevinta de la aŭtoro la permeson, konigi unu el liaj verkoj pere de nia kara Esperanto al internacia legantaro.

Mi esperas, ke mia intenco havos ankaŭ la deziratan sukceson, nome ke la estimata gesamideanaro legos kun la sama intereso ĉi tiun libreton, kiun la aŭtoro mem certe meritas.

Wien, en Januaro 1924.

La tradukinto.

*) Waldemar Bonsels: Menschenwege. Verlag der Literarischen Anstalt (Eldonejo de Literatura Instituto) Rütten & Loening, Frankfurt am Main.

Ofte mi pensis: hodiaŭ mi estas ĉi tiu kaj morgaŭ tiu, neniam simila al mi mem kaj tamen ĉiam la sama. Mi opinias, ke mi estas homo tute sen iu tiel nomata karaktero, sen difinoj kaj sen baroj, forta kaj malforta, malriĉa kaj riĉa. En mia brusto loĝas herooj kaj krimuloj, sanktuloj kaj infanoj, dioj kaj bestoj, kaj kiun mi amas, tiu mi estas. Mi disfluas en ĉiu ardo, savas min en ĉiun ĉielon, kaj en kiom ajn da abismoj mi falegis, mi revenis tamen el ĉiuj en tiun sensencan realaĵon, kiu signifas mian mion. Mi estas pli malĝoja kaj pli feliĉa, ol ĉiuj homoj, kiujn mi konas kaj tamen ofte mi envias ilin pro ilia talento, laŭ kiu ili povas akcepti aŭ rifuzi tion, kion ili konsideras bezoninda aŭ malakceptinda por ilia malvasta mondo. Ili reprezentas ĉi tion aŭ tion, male mi estas ĉio aŭ nenio.

Kvankam mi diris al mi, ke la stato de ĉi tiu sin mem percepto devas esti konsekvenco de miaj senripozaj migradoj kaj de mia konstanta solestado, tamen ofte min ĉagrenis, ke mi ne komprenas, kian utilon povus havi tia eco por mi aŭ por aliaj. Renkontinte en libroj, en bildverkoj aŭ en la ĉiutaga vivo de miaj spertoj figurojn, kies esenco influis min al estimo, mi povis bone kompreni ilian econ kaj mi fervore imitis ilian agadon, esperante akiri per tio ilian formon, ilian certecon kaj ilian valoron, sed senkuraĝigite mi forĵetis post mallonga tempo ilian bildon el mia animo kaj senhalte mi rapidis pluen, libera, kaj kiel al mi ŝajnis, malriĉa kaj mal-kontentigita. Tiam mi ofte havis la senton, kvazaŭ la rimedoj de mia menso estus en tuta malordo, mi serĉis iujn simplajn homojn, parolis kun ili, observante malfide kaj spione mian efikon al ili, kaj ju pli mi sentis, ke mi ne estis laŭ

ilia speco, des pli ĉagrenite mi retiriĝis en la fendegojn kaj altaĵojn de mia forlasiteco.

Tiam mi ankoraŭ ne komprenis, ke la evoluo kaj kreskado de l' propra spirita formo efektiviĝas sekrete kaj ne laŭ videbla ordo, kaj ke ĉiuj tiuj individuoj, al kiuj ni en serĉema estimo kaj amo konsentis rifuĝon en nia animo, postlasas en ni konstruŝtonon de ilia individueco, post kiam ili foraperas. Kelkaj homoj estas en sia juneco malfermaj pordoj, altegaj trabaĵoj kaj ne supervideblaj planoj, efektiviĝas en ili pli, ol tion ili mem, kaj kutime aliaj povus percepti kaj la turmento de ilia sendecideco estas propre nur garantio por ilia dimensio, por ilia amplekso kaj por tio, ke estiĝos unufoje sur larĝa, multforma bazo bona konstruaĵo. Sed ili ne scias ĝin, kaj neniu povas preni sur sin ilian suferon. Pli minacate ol aliaj, kiuj frutempe moderiĝas, ili renkontas sian pereon, pro ilia inklino, lasi perfortigi sin per la pretendo de sia ĉirkaŭularo, aŭ ĉar la fontoj de ilia amo perdiĝas en la dezerto de homfremdeco. Ĉar ili estas pli sentemaj, ol aliaj, ili pli facile estas subvenkitaj, ĉar ili estas pli molkoraj, ili pli volonte obeas kaj ilia deziro, signifi ion por la homoj, lasas sin senpripense logi en simplan servopretecon, antaŭ ol ili estas akirintaj sian forton al vera utilo por la homaro. Ĉar sola sentemo kaj impreseblo, sen sia ekvilibro de forto kun certa instinkto por la rajtoj de fortulo, estas senŝirmaj donoj de bonkoraj anĝeloj, starintaj sen Dio ĉe nia lulilo.

En miajn vivtagojn kun tiaj pensoj kaj kontrastaj sentoj venis la persono de Ŝolandro, mirige sendita en tempo, en kiu mi lin bezonis, kvazaŭ vivrespondon, averton kaj subtenon. Ĉar mi sentis amon al li, tial lia influo al mi estis grava, mi provis ekkoni kaj ampleksi lian karakteron tiel, ke mi lin spirite konsideris tio, kio li povus esti, kaj tiamaniere mi estis gardita, supertaksi la malŝatindajn aperaĵojn de lia malvirto. Mi vidis en li la subiĝantan sunon de l' vivo kaj ne la skorion de ĝia fajrego, postlasitan en lia degeneranta korpo. Aliaj povis havi en sia juneco pli distingajn edukantojn,

kiujn ili sekvis en lumo de tute alia estimo kaj kies influon ili aprobas per alia tono de respekto, ol kiel sonas la bendeziro, kiun mi eldiras pri Ŝolandro. Memstaraj disciploj de l' vivo elektas sian edukanton laŭ la sekreta pretendo de sia propra individueco kaj multe da ne memstaraj instruistoj tordis pro tio siajn manojn pri la malmoraleco de siaj lernantoj. Sed la sorto de mia juneco direktis miajn okulojn al la koro de l' vivo kaj ne al ĝia vesto, neniu avertis aŭ gardis min kontraŭ ĝiaj mizeroj, sed ankaŭ neniu povis fermi miajn okulojn kontraŭ la kaŝita potenco kaj pleneco, kiuj sin malkaŝas nur al kuraĝulo, kiu, nenian atentante danĝeron, riskas ion, malestimante doktrinon, kiu lin ja gardas antaŭ kelkio, sed kiu al li ankaŭ nur malmulton malkaŝas.

Tiutempe mi vivadis ial en la urbo, kvankam estis somero, mi venis dum mia tramarŝado en la mallarĝon de l' malnovaj stratoj kaj tie mi restadis, altirite per vanta emo al bruado, maltrankvilo kaj forgeso. Mi vendadis bildkartojn kaj gazetojn, librojn kaj revuojn, sur la strato aŭ en gastejoj, por trovi mian vivtenadon kaj loĝis en subtegmenta ĉambreto meze en la urbo, en pramalnova domo, staranta sur malhela, angula placo. El mia fenestro, se mi iom antaŭen kliniĝis, mi vidis trans la tegmenta akvofluilo sur la verdon de broncostatuo, prezentanta sinjoron en plej bona aĝo, en salonjako skulptitan, kiu havis antaŭ longa tempo multajn meritojn pri la bonfarto de la urbo. Du, pro soifo preskaŭ sekiĝintaj, tilioj ombrumis lin laŭpove, paseroj kriadis matene inter iliaj branĉoj, kiam la matensuno ilin tuŝis, kaj kelkfoje moviĝis sur iliaj pintoj milda ventspiro, erarinta el la verda malproksimo, mia kara mondo, inter la murojn de la placo. Mi sentis min parenca al ĝia sorto kaj pensis ofte pri ĝi, se mi, ofte en malfrua nokto, ekdormis ĉe ĝia mistera flustrado.

La butikoj, en kiu mi aĉetis miajn kartojn kaj gazetojn, apartenis al jam grizhara judo kun granda agemo kaj malgrandanima lerteco, krom ĉi tiu komercado, provizanta la plej multajn kolportistojn en la urbo, li gvidis ankaŭ presejon, al

kiu apartenis ankaŭ eldonejo de socialdemokrata gazeto kaj de malmultekostaj libroj. Ĉi tiuj libroj estis disvendataj pere de anoncoj, aperantaj en tagĵurnaloj, kun superskribo k. e.: „Ĉarmaj artikoloj por viroj!“ aŭ „Novtempaj moralpentraĵoj!“ kaj ili havis mirindan sukceson. Kelkfoje interveno de la polico subite finigis la vendadon de unu el ĉi tiuj verkoj, sed kutime nur post kiam la eldonisto jam havis sian bonan profiton. Lia nomo estis Benjameno Elkan. Grumblante, sen-vorte kaj ageme movis sin la malalta, dika, per malpura nigra jako vestita viro en la malvasta sfero de sia agadrondo, kaprice simpatianta kun ĉio, kio montriĝis por iam sukcesriĉa, malfidanta kontraŭ ĉiuj ŝancoj, prezentigantaj por venigi lian komercon sur pli altan nivelon aŭ pli liberajn vojojn.

Kiam mi la unuanfojon venis al li, post miaj enkondukantaj vortoj, konigantaj al li mian deziron, li per malrapida oblikva kapklinado metis sian rigardon en ĝustan proporcion al siaj okulvitroj kaj ekzamenis min per malamika atento, ne interrompante min. Kiam mi silentis, li demandis min, ĉu ne pli volonte mi laborus ĉe li, en la domo, en la redakatejo, en la kontoro, aŭ ĉe vendado al malgrandaj komercantoj. Mi rifuzis.

„Vi havos tegmenton super vi, tablon antaŭ vi, komfortan seĝon kaj puran laboron sen kriado kaj kurado“. Li imitis la formon de la seĝo per la manoj, laŭ tio ĝi estis remburita. Sed mi ne povis rezigni mian liberecon kaj mi sciis, ke mi eĉ ne unu horon povus elteni en ferma kontoro.

„Kiel vi volas“ diris sinjoro Benjameno Elkan, kvazaŭ li konsiderus min perdita. Poste li elpensis kompromison: „Vi povas legi korektaĵojn, klerajn aĵojn . . . rigardu la presejon, la laborejojn.“ Li antaŭkuris min, kvazaŭ li estus fuganta, samtempe fiere kaj senhelpe.

En alta plantaĵejforma budo staris longa tablo, ĉe kiu laŭvice sidis viroj kaj virinoj, junuloj kaj knabinoj, kvazaŭ ĉe lerneja benko. La ĉambrego estis samtempe redakatejo, librotenistejo kaj pakadejo. La rigardo straten estis malebligita per

opakaj vitrotabuloj, neniuj sunradio trovis vojon en la helan, dezertan malliberejon. La puŝado de la rapidpresmaŝino skuis ĉion kaj tra malklara vitra pario kun fenestraj pordetoj oni povis rigardi en la kompostejon, tial ke la okupatoj ĉi tie kaj tie povis kontroli sin reciproke. Tio estis lerta kaj malinda spekulado al la malfavoro de malbone salajrataj homoj, enviantaj unu al la alia la mizeran panon. En la magazeno estis la muroj amase plenigitaj ĝis la plafono per gazetoj, libroj kaj broŝuroj; odoris de gluo kaj kartono, kiel en librovendejo. La interrilatoj de Benjameno Elkan al siaj dungitoj havis ian maldelikatan kamaradecon, kiun li vane klopodis eviti, li estis samtempe grumblanta kaj konfidema, incitita kaj subiĝema. Kiam li devis peti, li ordonis, kaj kiam li povis ordoni, fariĝis lia postulo singarda peto.

„Bone“ li diris, „vi ne volas. Eble vi venos, kiam la vetero malboniĝos“. Li supenglitis sian altseĝon, kvazaŭ laŭ ekfermiĝanta seruro, aj translasis min al komizo, kiu donis al mi, kion mi bezonis. Estis rimarkinde, ke sinjoro Elkan ne postulis de mi antaŭpagon, en tiaj okazoj kutiman kaj necesan, li nur diris: „Vi venos pagi min“.

Kiam mi unu tagon venis por ree provizi min per bildkartoj de la urbo kaj per kelkaj dekduoj da malgranda gvidlibro tra la urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, mi trovis malplena la privatkontoron de sinjoro Elkan, de la strato kiel butikoj enireblan, kaj la pordo al la redakatejo estis vaste malfermita. La laŭta voĉo de la judo sonis en granda eksciteco, aliaj enmiksitis sin rapide kaj arogante, okazis sendube disputo. Ĉe la elirejo de la presejo staris la kompostistoj kaj la maŝinmajstro kun sia makulita blua kitelo kaj aŭskultis kun intereso, fervore partoprenante kaj kun mienoj de respondeco. Ĉe la karaktero de Elkan estis tre kompreneble, ke la tuta komercado estis praktikata kaj procedata kvazaŭ komuna familia afero, li kontraŭbatalis tion, sed li perdis ĉiam denove la respekton kiel ĉefe per tio, ke li tro konfidenciĝis kun siaj dungitoj. Estis do kompreneble, ke la eksplodoj de gravaj

opinidiferencoj ne okazis plu alie, ol kun perforto. Mi jam kelkfoje observis, kiel estis al la posedanto malfaciligite, validigi sian presti on, kaj tamen nur li mem estis kulpa pri la malindiĝo de l' interrilatoj.

Estis ankoraŭ sufiĉe frua mateno, la rapidmaŝino staris trankvila, la gazeto, trifoje semajne aperanta, estis nur je tagmezo preta. Mi estus foririnta, por reveni en pli konvena horo, se ne estus kateniginta min la staturo de viro, parolanta kun Elkan kvazaŭ kun lernejnabo. Sub rimarkinde malĝojaj okuloj, laŭŝajne preskaŭ indiferentaj, alkriegis granda, barba buŝo la judon, griza harfasko, defalanta de senhara frunto sur la nukon, ne imageble ĉifonita jako el brunruĝa tuko kaj preskaŭ ĝis la genuoj refaldita, hela kvadratumita pantalono prezentis kune kun la akreco de l' voĉo, tiel strangan hombildon, ke mi restis frapite staranta en la pordokadro, por atendi la sekvon de la afero.

Koncernis verŝajne politikan artikolon, kiun ĉi tiu strangulo liveris al le redakcio kaj kiu estis ŝanĝita, laŭ iu direkto, kiun la aŭtoro ne volis aprobi. Mi ne komprenis, ke Elkan toleris la vere brutale maldelikatajn insultojn de la viro, ne eksiginte lin antaŭ la pordon, sed ĝi restis al mi nur por mallonga tempo ne klarigebla, poste kaptis min kvazaŭ varma aerblovo, la ankoraŭ ne firma, sed en sia efiko ne refutebla opinio, ke ĉi tiun laŭtan, malbelan kaj strangan homon oni ne povas trakti kiel aliajn homojn, ke li vekis en la koroj sekretplenan simpation, kies origino estas malfacile ekkonebla, sed kiu pli intense efikis, ol kiu ajn maldelikata senprudento de lia agado. Estas strange, ke el ĉio, kio estas propraĵo de homo estas plej malfacile kaŝeblaj liaj animfortoj. Nenia, eĉ ne plej malbona eco povas subpremi ilin, nek egoismo nek malico, ja eĉ ne fiaĵo kaj malnoblaĵo. El tio sole venas, ke ni pardonas al kelkaj homoj ilian plej grandan kulpon kaj male al aliaj eĉ ne la plej malgrandajn.

Ĉi tiu estis mia unua renkonto kun Ŝolandro. De el mia observejo kun fervoro de mia juneco mi aliĝis al lia opinio,

ne sciante ankoraŭ, pri kio temas, sed ju pli longe, des pli firme kovinkite pri la praveco de lia kolero. Sinjoro Benjamin Elkan sukcesis ŝovi la kolerigiton en sian privatkontoron kaj fermi la pordon, mi estis kune enŝovita, sen ke min unu de la disputantoj aparte atentis. Ŝolandro tenis du presprovaĵojn de la artikolo, ĉifitajn paperfoliojn, en mano kaj ĵetis ambaŭ samtempe per pugno sur la pupitron, kvazaŭ sur keston.

Se vi ĝin presigos tiel, kiel ĝi estas ĉi tie fuŝaliigita“ li kriis „tiam ĝi estas la lasta vorto, kiun mi skribis por via abomena fiĵurnalo, por ĉi tiu semajna liverilo de anoncaĵoj kaj burĝa malpuraĵo“.

Elkan iom trankviliĝis. Li forviŝis la ŝviton de la frunto kaj balancis sur sia leda trono, kvazaŭ la kutima sidilo donus al li pli da firmeco, ol siaj piedoj:

„Se ni ĝin aperigos tiel, kiel vi ĝin konceptis, tiam estas la lasta vorto kiun vi por mi skribis, ĉar oni malpermesos la gazeton! En la lasta punadmono estis skribite, ke mia gazeto estus malpermesita, tiam estos eks por mi kaj eks por vi, eks por ni ambaŭ, ĉu mi estas stultulo?“

„Memkompreneble“, diris Ŝolandro. „Kio alia vi ja estus? Se ni lasas nin malkuraĝigi, tiam la oficestraro havas facilan ludon, pli ol ĝi mem estas tion pensanta. Ju pli ni cedas, des pli ni estas subpremataj. Ĉu tio estas io nova? Se ni volas atingi la duonon, ni devas riski la duoblon. Per kio ja ekzistas via gazetaĉo, se ne per sia kontraŭdiro? Neniu honesta homo prenos ĝin plu en manon, se ni ĉesos esti malhonestaj. Nenio pli enuas ĉi tiun indiferentan burĝaĉaron, ol sia propra virto.“

Li klinis sin super la korektaĵfoliojn kaj komencis legi.

„Kion ni do faru, se . . .“

„Silentu!“ kriegis Ŝolandro, kaj Elkan, konanta lin, sentis, ke li devas cedi kaj akomodigis sin.

Ŝolandro prenis de la pupitro, ĉe kiu li estis staranta, skatolon da alumetoj kaj bruligis cigarstumpon, kiun mi

ekvidis sub la barbo nur, kiam li antaŭen ŝovis la lipojn, tiel ke la tabakrestaĵo teniĝis inter ili, kvazaŭ ŝtopilo en ruĝa botelkolo. Legante li ŝovis la skatolon en la pantalonpoŝon, sed ĝi tuj reaperis malsupre kaj falis inter la disŝiritajn ŝuojn.

Ŝolandro ekrigardis min, suprenlevis la skatolon kaj diris: „Pardonu.“ Apenaŭ videbla rideto de embaraso, deteno kaj moko certigis por ĉiam mian simpation al ĉi tiu homo. Estis profunda emocio sen kompatato, kiu min kaptis, tiu duone el hontiĝo kaj duone el sufero konsistanta emocio, kiu tiel ofte povas fariĝi en ni kaŭzo de simpatio. Mi vidas ĉe iu kunulo lian sintenadon kaj lian modestiĝon en malriĉeco, kiun ni mem ne volas toleri kaj dume nia sento de prirespondeco vekigas, rememorigas al ni la amo, kiel sola elturniĝo el la zorgoj kaj mizero de l' vivo.

Ŝolandro firme eltenis mian rigardon: „Kion volas ĉi tiu?“ li demandis senĝene sinjoron Elkan kaj sen esti pro tio deturninta siajn okulojn de mi.

„Kiu?“ demandis la judo, rerigardante kaj provante trarampi sub sia okulvitro. „Ha, tiel, bone, diru al mi, kion vi volas de mi.“

Ŝolandro aŭskultis min. Kiam mi intencis foriri, li ĵetis la presprovaĵon sur la skribotablon de Elkan, murmuris grumbantan konsenton kaj forlasis kun mi la kontoron. La suno brilis sur la straton, estis proksimume la deka matene kaj belega tago. Apud la domo, sur la malalta ŝtonbalustrado de la fenestro kaj sur la fera kadro de la kelopordo kaŭris kaj staris kelkaj maljunaj virinoj, atendantaj la gazeton, por ĝin disporti.

„Efektive estas por mi ĉio tio indiferenta“, diris Ŝolandro trankvile, kvazaŭ li parolus kun malnova konatulo, „sed la fatalo estas, ke oni devas ĉion, kion oni faras, tamen por la momento fari kun sia tuta persono, kun ridinda sindono, kiun ni el si mem havas, kaj kiu ne estas donite eble nur per la speciala temo. Mi envias la homojn, kiuj, akomodigante al la okazo, povas partopreni ĉiam laŭ bezono kaj prudento. Kaj

tamen pelas nin pli alta prudento en niajn stultaĵojn, ol ĝin ĉi tiu aĉularo malgraŭ ĉiu praktika lerteco estus pensinta“.

„Ju pli grandaj estas la postuloj al ni mem, des pli evidentiĝos la cirkonstancoj, ĉe tia strukturo, al nia profito“, mi diris.

Ŝolandro haltis.

„Tio estas ĝuste“ li diris laŭte kaj impresige.

Li miris, sed sence, li rapidece konsideris ion tiel memkompreneblon, kion rezigni estis lia malĝoja kutimo. Pli rapide ekpaŝante li ridis malice antaŭ sin, kvazaŭ li estus sekrete prava per mia respondo kontraŭe ĉiuj tiuj, kiuj lin misuzis. Li eĉ unu momenton ne dubis, ke mi lin sekvos.

„Kien vi volas?“ li demandis, kvazaŭ mi estus lin ĝenanta.

„Mi iros kun vi“ mi respondis.

„Ha, libera birdo, havanta nenion por fari, nenion por perdi, postkuras iun. Nu, tion mi kutimas“.

„Mi estas malsata“ mi diris, ĉar estis dezirinde por mi, ke ni venu ie al trankvila interparolo.

„Ha, tiel“, li diris amike. Bone. Mi havas ankoraŭ kelkajn markojn en la poŝo. Tial do . . .“

„Espereble ne en la pantalonpoŝo“.

Ŝolandro laŭte ridis kaj haltis ree.

„Vidu nur, kiajn spritaĵojn li faras. Mi tuj pensis, ke vi vidis tion kun la alumetskatolo. Sed koncerne monon, estas ĉe mi tute indiferente, kien ajn mi ĝin enmetas, ĝi en neniu poŝo restas ĉe mi“.

„Mi havas mem monon“ mi diris, por forigi lian seniluziĝon.

„Kial do vi postkuras min?“ malserene li demandis.

„Nu . . . nur tial.“

„Ni iros en mian kutiman gastejon“, subite gajigite li respondis. „Je tia bela tago oni devas festi la sunradion en malluma angulo, tie oni nur lernas vere ŝati ĝin. Al tio guteto da vino kun montsuno en ĝi el la jaroj de l' juneco, tio estas miksaĵo por malgajaj koroj. Antaŭen do!“

Li antaŭenpaŝis kvazaŭ li marŝus en militon. Lia jako malantaŭe postflugis kaj sur la ŝultroj speguliĝis la brilo. La larĝaj, maldikaj pantalonoj alkonformiĝis kiel flagoj al siaj bastonegoj kaj la disŝiritaj ŝuoj flirtis. Li portis unu brunan kaj unu grizan ŝtrumpon, sed tio ne estis videbla, ĉar ambaŭ estis malsupren glitintaj en la tibiingojn de la gumelastaj ŝuoj. La nobleformaj, malflegataj manoj pendolis vaste for de la lumboj, evitante lian larĝan marŝadon, oni rigardis post nin.

Eble li estas kvardek jara, mi pensis, eble kvindek. Kiujn vivvojojn estis ĉi tiuj piedoj irintaj? Li estas ankaŭ unu el la vagistoj, kiuj ne devenas de sur la strato, li kreskis dum ŝanĝo de du tempoj, kiel infano de ambaŭ kaj vagadas inter ili ambaŭ, kiel birdo luktanta inter du nubaroj, en la aerkirlo de iliaj vojoj. Per la malnovo ligite, de la novo tuŝite, por ambaŭ ne sufiĉe forta, sendecide pro admiro kaj forta nur por senutilaj oferoj. La silentanton apud mi kaj lian esencon mi sentis, kvazaŭ li parolus pri si mem. En sekreta teruro mi sentis min parenca al li kaj ligis tamen al li mian plej bonan esperon. Kia ajn li estu, mi pensis, li estas homo. Mi jam frutempe sciis, kiel malfacile estas, esti homo.

Ha, kiom pli mi ŝatis malperfektajn homojn, kies koroj varmigas, ol tiujn aliajn, je kiuj la tero estas riĉa en multaj taŭgaj formoj, kaj kiujn mi ekzilis el mia vivo, ĉar ili estas senkoraj. Mi pensis al Teja kaj en la malĝojo, kiu min plenigis, ŝajnis Ŝolandro al mi bela.

„Mi preferus iri ekster la urbon“ mi diris al li, „sur someraj kampoj, tra montvaloj, aŭ inter vastaj horizontoj sub la ĉielo foren, ne inter domoj.“

„Jes, jes“ li diris kaj okulumis al mi kun bonanima prodomaĝojo „kiam oni renkontas siaspecan en mallibereco, tiam oni plej melankolie pensas pri sia propra libereco. Ĉu ne ion tian vi ja volis diri? Sed nin nuntempanojn tenas kaptite la urbo, kaj kiu vidas en ĝi ian malon de la naturo, ties konsideroj estas tro konservativaj, kaj por li estas la esenco de l' naturo neniam komprenebla laŭ io alia, krom

laŭ kampo, arbaro kaj herbejo. Ĝuste tiuj, kiuj opinias, ke ili povas per fasko da fojno ŝtopi la fendetojn de sia animo, tiuj eltenas malpleje la naturon, kvazaŭ ĝuste ni urbanoj de ĉi tiu jarcento ne bezonus pli da forto por vivado en la sen-senteco de la libera naturo, ol por estado en la torentoj de l' homamaso, de bone preparitaj vojoj, de malvarmeta aero, de firmaj opinioj“.

La gastejo, en kiun min Ŝolandro kondukis, estis en mallarĝa, flanka strato, en la ombro de l' Mariopreĝejo. El ekstere ĝi estis malfacile konebla kiel publika mastrumejo, la fenestroj estis duone kovrataj per malnovmodaj verdaj rul-kurtenoj kun multkoloraj bildoj sur ili, kaj la vitra pordo portis nenian invitantan surskribon, nek ian signon, laŭ kiu oni povus supozi gastejon. En la ventdetena antaŭbudo de la enirejo kuŝis malgranda nigra hundo, kiu seninterrompe fiks-rigardis la anson de la pordo, gvidanta en la gastej ĉambron. Ŝolandro alparolis lin kaj atendis, sed la besto turnis sin al li nur unu foje por momento, kvazaŭ mirante, ke iu sen bezono restis por iom da tempo en ĉi tiu ligna kajuto, kaj ĝi ree alrigardis la anson.

Nur iom post iom mi konatiĝis kun la propreca ĉarmo de ĉi tiu ejo, kiu en komenco ŝajnis al mi dezerta, soleca kaj malagrable, kiom pli mi komprenis, kiel ĝi akomodigis per sia modesta simpleco al la pretendoj de la societo, ĝin en mal-granda nombro vizitanta. Nur ambaŭflanke de la kahelforno estis du gastamaj balkonfenestroj, cetere staris la lignaj tabuloj antaŭ la apudmuraj benkoj, ĉirkaŭe en la ejo, kun eluzitaj lignaj seĝoj kaj malpuraj tablokovriloj. Kelkaj vitraj ujoj, pri kiuj oni ne povis konstati, ĉu ili estas trinkaĵujoj aŭ muŝ-kaptiloj, brilis pale en la krepuska lumo, eĉ unu sunradio ne enpenetris inter ĉi tiujn murojn kaj iom surdiga, dolĉetaodoro de rumo kaj gaso plenigis la aeron. Vespere sidis regule mastro Kalaŭer, aŭ almenaŭ nomita tiel, malantaŭ la enverŝejo, grasa kaj dormema, sed tamen plena de sekreta atentemo pri siaj gastoj, kio cetere koncernis pli sian bon-

farton, ol tiun de siaj prizorgatoj. Li enverŝis mem la vinon kaj brandojn, blovis okaze de ĉiu enverŝado en ĉiun bierglason, por konstati sub la ŝaŭmo, ĉu la ĝusta mezuro estas jam atingita aŭ ne jam troa, li maĉis tabakon kaj kraĉis de sur sia sidloko sur la plandon duoncirklon, kiu laŭ la tempo de l' tago montriĝis pli malpli preciza makulringo, kvazaŭ la ringo de Saturnuso. Poste mi sciigis, ke malantaŭ la enverŝejo estis pordo al dua ĉambro, estanta al dispono nur de regulaj gastoj kaj eĉ al tiuj nur dum specialaj okazoj, kaj estis nomata la franca ĉambro.

Tamen la unua, momenta impresio, kiun ĉi tiu gastĉambro faris, estis tute tiu de simpla, iom malflegita mastrumado, povanta nur pene ekzistadi per kelkaj senpretendaj regulaj gastoj el la proksima regiono, kaj de kiu fremdulo ne povis atendi ion alian, ol enuon kaj malbonan vinon.

Kiel ĉiam ĉe iu celo, atingita post specialaj atendoj, kaptis nin ioma seniluziigo, kiam ni estis sidantaj sur unu el la seĝoj apud la forno. Koncernis kvazaŭ trovon de nova komenco post tro alte taksata entrepreno. La humila komplezemo de Ŝolandro estis kontraŭvola, li vokis laŭte la mastron kaj ŝajnis malbonhumorigi la gastojn per sia sintenado. Ĉeestis ankoraŭ tri aŭ kvar personoj, unu simple, sed bone vestita viro sidanta sur apudfenestra loko ĉe glaso da ruĝa vino kaj fervore skribanta kaj kalkulanta, unu juna pala homo, kiu sidis mute kaj malbonhumore apud knabino, kaj konsumis malfruan matenmanĝon el papervolvaĵo. Li bongustigis la panon kaj klobason per brando, la glaso antaŭ la knabino, kiu malĝoje fiksrigardis la lumon de l' fenestroj, staris netuŝite inter la gazetĉifonoj, li donis al ŝi kelkfoje peceton per la forkopinto.

La mastro salutis Ŝolandron indifere, kaj alportis vinon. Li ekzamenis min per laca rigardo kaj ridetis malŝateme. Ŝolandro evitis interparolon kun li, kaj la mastro reiris malantaŭ sian botelartablon, ne plu atentante nin. Li nur demandis ankoraŭ, ĉu ni volas ion manĝi. Kompreneble,

ion pretan. Li vokis ion tra duonferma pordo, tra kiu estis aŭdebla bruoj el kuirejo, voĉo de servistinoj kaj tintado de vazaro.

Ŝolandro profunde eksopiris kaj eltrinkis rapide du glasojn unu post la alia, kvazaŭ en la spirito de l' vino li serĉus apogon, instigon kaj liberecon. Mi komencis paroli kaj rakontis, kiel mi vivas, mi ankaŭ malkaŝe diris al li, kio min katenis al lia persono kaj ke mi tre ĝojus pli intime konatiĝi kun li. Li aŭskultis min atente sed kun kaŝita inciteco, sed li ne interrompis min, li eĉ kuraĝigis min daŭrigi, kvankam nur per mokema intereso. Ŝajnis malbonhumorigi lin, ke mi tiamaniere akiris ian por li ne konvenan avantaĝon; li sentis, ke mi estis ĉe nepra sinreteno iom indulgema, klopodante estigi senĝenecon. Ĉar mi mem sciis, ke mi tion faris, kaj ke estis kontraŭ lia karaktero, precipe en lia ŝajne tiel malprofitigita vivstato, ŝajni eĉ nur dum momento indulgon bezonanta, tial mi komprenis lin, kiam li malĝentile diris:


„Vi havos la ĝustan ideon pri mi! Estu eĉ fiera pri tio, esti vidinta en mi pli, ol ĉiu dua vidas, kaj fine vi enuiĝas, tial vi sidas ĉi tie. Neniu vin tenas, ĉu vi komprenas?“

Ne devus mi esti konanta mizeron, por ne kompreni la diron de tiu, kiu ĝuste ĉe iom da kompreno pri sia ĉagreno ne anstataŭas hontigan konfeson per spita fiero. Tiamaniere mi neniam false taksis Ŝolandron, mi sciis, ke mi estus lin trompinta kaj ofendinta, se mi estus konsentinta liajn vortojn. Ne estis grave por mi, esti al lia plaĉo dum unu fluga kaj vanta horo, aŭ ke li estu ĝi al mi, sed mi volis gajni eniron en lian animon, kies profundan baton mi perceptis en intima distanco, kaj mi sciis, ke tio neniam sukcesas, se ni ne malkaŝas mem sincere nian koron.

„Vi mensogas“ mi diris serioze, „mi serĉas nenium, nur min mem, same kiel vi“.

„Vi timas pri via sorto, mia amiko kaj vi volas pere de mi rigardi iomete en vian estonton“.

„Mi ne riskos esti al vi kompleza per tio, ke mi alĵetos al via vanteco la pecetojn, kiujn vi eble glutos, por povi min malestimi.“



Ŝolandro alrigardis min kiel lupo.

„Vidu nur! Venas kiel ŝafo ĉi tien kaj havas dentojn en la cerbo. Konsentite! Al via sano frato!“

Mi kunpuŝis kun li la glason, sen esti ridetanta. Timo, perdi tion, kion mi gajnis, tremigis min, mi estis serioza kaj mi ne komprenis la premantan zorgon, per kiu mi varbis pro tiu ĉi viro, kiel pro la unua amiko de mia vivo. Ĉiuj homoj nomas sin solaj, kaj eble ili ankaŭ ĝi estas, ĉiu laŭ mezuro de sia pretendo, de sia kvalito kaj sia valoro, sed veran solecon sentas nur tiuj, kiuj neniam eĉ por momento ĉesis kredi al la interfratiĝo de ĉiuj homoj.

„Tiel oni renkontas sin reciproke“, diris Ŝolandro kun sopiro „kaj morgaŭ oni ree iras en la malproksimon. Sed hodiaŭ estu bela tago. Vi nenie restadis kaj restis nenie alligita, tio estas bone, sed danĝere. Kiu amas la danĝeron, ne perceptante ĝin, al tiu estas facile, sed ĝin vidi kaj resti kuraĝa, tio estas alia afero. Mi, kiel vi min ĉi tie vidas, — estas ja nur hazardo, ke lastfoje ne ĉio efektiviĝis laŭ deziro, — mi prenis sur min la batalon kun la vivo. Komence ĝi ŝarĝis min per ĉiu rubaĵo, sed kiu travenis, tiu venkis ĝin. Min ĝi ne plu atakos neatendite, kiel ĝi iun tagon surprizas la somnambulojn. Ĉu ne iradas la plej multaj kvazaŭ en dormo? Inter ili estas la stultkapuloj eĉ la plej tolereblaj, ili havas sian pasporton de l' ĉielpatro. Sed la prudentuloj, kiuj mem volas nenion vidi ĉirkaŭ si, tiuj estas la malamikoj. Al via sano!“

„Tiel rapide mi ne povas kuntrinki“.

„Ankaŭ mi devus moderigi min, sed se mi estas modera, mi taŭgas nenion. KREDU al mi, abstinenco, kie ajn mi ĝin aplikas, malbonigas min. Mi estas vulgara, se mi ne malaltiĝas, la altiĝo ne taŭgas por mi. Havaĵo, ĉu en sango, ĉu en la kapo aŭ poŝo, malpaciencigas min, faras min volupta, avida kaj senhalta en la fundo de mia animo. KIAM en mi io amasiĝas, mi fiiĝas, male se ĉio fluas, tiam mi trovas apogon kaj havas konsolon en varmaj, bonaj pensoj“.

Li lasis iom klinanta la grandan hirtan kapon, kaj kun

nevola malĝojeco, karekterizanta la kvietan esprimon de lia vizaĝo, li rigardis en la palan brilon de la vinglaso. Poste el la jakpoŝo li prenis mallongan pipon, plenigis ĝin neglekte per mallertaj fingroj, tiel kiel oni premas faseolosemon en la printempan teron, kaj ŝovis la piptubon inter la lipojn, tra la lipharoj, kvazaŭ tra arbeto.

„Kiel ajn mi amas mian liberecon“ li diris, „oni sidas nun ĉi tie, ĉu oni volas aŭ ne, la tago forpasas. Oni vivas, kion do deziri? Mi amas la vivon, tial venas miaj kapricoj kaj feliĉanimeco. Aliaj staras en reala, kvazaŭ geedza ligo kun la vivo, sed tamen nia speco kreas la daŭrajn infanojn de l' spirito, per agoj, aŭ pensoj“.

Li parolis emfaze, kaj ruĝiĝis per ĉi tiu propra ardo. Jen fanfarone, jen rezigne, nun en malŝatema indiferenteco, nun en heroeca trograndigo de noblaj ideoj, tiel li rulis antaŭ min en senĉesa fervoro la multkolorajn bildojn de sia vivo kaj de siaj pensoj. Li parolis flue kaj bele, samtempe akre kaj vante, kvazaŭ laŭ koloraj fontoj kaj malhelaj marĉoriveretoj eliĝis el lia animo, kun profeta ravo, melankolie pro homara malĝojo, frivole kaj plene da feliĉiga espero.

Mia manĝaĵo estis jam de longe konsumita, la vino potence efikis en mi, ekstere la posttagmeza sunlumo oblikve falis sur la vitrojn de la kontraŭaj dommuroj, kaj en la gasteja ĉambro sidadis gastoj, foriris kaj ree novaj venis. Ŝolandro proponis translokiĝon en alian lokon, en bierelverŝejon sur la magistrata placo, sed unue ni trinku kafon. Li gestis detene al la mastro, la maljunulo komprenis kaj kapjesis. La freŝeco de l' libera aero ĉirkaŭprenis nin, kaj la bonfartiga bruo de l' stratoj. Ŝolandro kaptis mian brakon, kaj ĝis muta raviĝo superŝutis nin la vivo de aliaj, ilia agema rapido, ilia serioza preteco, la spiro de mil devoj kaj la silenta ŝarĝo de l' homamaso ĉirkaŭe. Mi sentis min libera kaj feliĉa, kvazaŭ sur hela insulo de atendado, kiel kaptito de mondsplendro, feliĉege apartigita kaj samtempe por ĉiuj amon sentanta.

Du horojn antaŭ noktomez oestis Ŝolandro senkonscie ebria, kaj mi estus estinta senhelpa, se en la trinkejo en kiun ni laste venis, oni ne estus sciinta lian loĝejon.

Tiamaniere mi sukcesis post multa penado lin hejmen venigi, iu helpis al mi kaj mi rememoras al kelkaj kompatemaj vortoj, plenaj da kondolenco kaj bedaŭro, sed mi rifuzis ĉi tiun intimiĝon kun miaj sentoj por Ŝolandro, kaj mi adiaŭis la fremdulon tuj, post kiam mi lin ne plu bezonis.

Kiam mi ekfunkciigis sonorilon sur la pordo de Ŝolandro, mi vidis, ke en la malnova domo, mallumiĝis fenestro apud-porda, kaj mi aŭdis alproksimiĝon de mallaŭtaj paŝoj. En la brilo de l' strata lumigado mi ekvidis virinon kun konduto kaj trankvileco de distinga sinjorino, vivanta en simplaj cirkonstancoj. Ĉagrena vizaĝo, malbela kaj zorgoplena, kliniĝis super la senhelpa viro, apenaŭ mi estis respektata per fluga saluto. Sed la esenco de ĉi tiu silenta staturo montris nek indignon nek abomenon, apenaŭ incitecon aŭ malpaciencon, ĉio saĝnis okazi laŭ kruela kutimo. Mi vidis ĉe la brilo de kandelo preskaŭ malplenan ĉambron kun unu lito, skribotablo, kun senorda amaso da libroj kaj paperoj, ŝranko kaj lavadkesto. Escepte la troŝargita skribotablo estis ĉio preskaŭ per vulgara ordo konservita kaj prizorgita, nur la strangaj bildoj sur la muroj ŝajnis ekzistadi en sfero, kiun la ĉi tie agantaj, ordigantaj manoj ne tuŝis. Kiam mi vidis, ke Ŝolandro estas gardata, mi foriris, ekscitite lace kaj samtempe animaltigite kaj seniluziigite. Nur nun mi vidis, ke mi troviĝas sur mallarĝa, malnova placo, kiu estas rektangula kaj kun egalaj domoj, silenta kaj malluma, kvazaŭ korto. Super la arbovico, kontraŭe de la domo, staris la blanka plenlumo kaj ĵetis la ombrojn de la arboj kvazaŭ tapiŝojn sur la straton. Mi vidis benkon en la lunombro, iris tien, kaj sidigis min tute senfortigite sur ĝin. Horloĝo sonoris, mi sentis kvazaŭ mi estus veninta en tute fremdan urbon, dumtage mi estis neniam en ĉi tiu regiono.

Malrapide kvietiĝis miaj sentoj kaj pensoj, sed mi ne fariĝis gaja. Timigis min ĉi tiu dezertigita scenejo de l' kruela vivo. Kvankam la ĉielo respeguliĝas en malklaraj riverondoj, sed tamen ĝi ilin ne klarigas. Sed ĉu ili ne reĵetis ĝian lumon en puraj radioj? Mia sendecideco turmentis min, mi ankoraŭ ne estis kapabla apartigi pro mia propra trankviliĝo la mondon de faktoj de la mondo de ideoj, sammalmulte kiel Ŝolandro tion iel kapablis. Sed mi antaŭsentis, ke en tio kuŝas lia fatalo, kaj kun korpremo kaj kolero mi komprenis, ke la vera spirita vivo komenciĝas nur post voldecidiĝo. Sed ju pli mi volis min savi, des pli mizera mi ŝajnis al mi.

Jen estingiĝis la lumo en la ĉambro de Ŝolandro. Baldaŭ post tio estis la dompordo singarde malfermita, kaj mi vidis la staturon de la virino, kiun mi ĉe li renkontis, forlasanta atenteme kaj mallaŭte la domon. Sensone glitis ŝia piedo sur la ŝtonoj, kvazaŭ ŝi moviĝus kiel ombro, kaj ĉe la angulo de unu el la flankaj stratoj ŝi malaperis. Io, kvazaŭ fratina saluto, postrestis en la nokta silento, la antaŭsento kaj melankolio de homamo sen gloro kaj nome, de senornama valoro. kiun nur la okuloj de anĝeloj vidas.

* * *

Longe mi ne povis ekdormi, mia malgranda ĉambro estis plena de nokta lumo, kaj de tempo al tempo sonis paŝo sur la placo, kaj ĝia eĥo resonis ĉe la stratanguloj. Pezaj veturiloj moviĝis en la malproksimo, malrapide evoluiĝis tra la krepusko de l' somernokto la nova tago. Tra mia fenestro vidiĝis la vasteco de l' ĉielo, klare ke hele, kiel mia vivo. Post kiam mi fine ekdormis, mi sonĝis, ke la mondo estas plena, kvazaŭ de varmega vento, de postuloj, ke io devas okazi. La homoj senkonsile vagadis en ĝi kaj alvokis sin reciproke: Devas io okazi! Ĉiu ŝajnis scii, pri kio temas, ĉiu por si mem, sed neniuj povis ĝin nomi. —

Revekiĝinte, blindigis min la taglumo, falanta per larĝa sunbrilo en la ĉambreton, kaj sur seĝo apud mia lito sidis

Ŝolandro. Li havis ĉapelon sur la kapo, grandan kiel ombrelo, kaj inter liaj genuoj altenstaris la apogilo de dika bastono.

„Plej belan bonan tagon“ gaje li diris „oni aranĝas al si komforte. Mi estis ĉe Elkan kaj transirante la placon, mi rememoris, ke ĉi tiu garbejo gardas vin sub sia tegmento.“

„Ĉu mi tion rakontis?“

„Verŝajne estas tiel, aŭ eble Elkan. Revekiĝu nur tute. Ĉu vi matene plej ofte vekiĝas gaja? Kiel alie ĝi povus esti. Ankaŭ mi vekiĝis feliĉa, kiam mi estis juna. Sed nun estas mia vekiĝo kelkfoje fortega, malica ektimo, kaj tiam mi vokas: estas mia fino, jes fino . . . kaj mi ŝanceliĝas pro malĝojo, se mi vidas la sunbrilon en la fenestro. Sed hodiaŭ mi sentis min bone. Ĉu ni iru ekster la urbon?“

Mi estis kun granda ĝojo preta. Ĉio premanta de la pasintaj horoj ŝajnis esti al mi por ĉiam ekŝiginta, ĉi tiu stranga viro konsideris ĉion, kio lin koncernis, kvazaŭ memkompreneblan, sian malfeliĉon, la mirindan konfuzon de siaj pensoj, nian amikecon. Li ĉirkaŭrigardis en la ĉambro.

„Vi estas malriĉa!“

„Mi posedas neniom.“

„Faras nenion, frato. Por la juneco estas bone, esti malriĉa. Rigardu la junulojn kiuj disponas pri ne propra havaĵo, ĝi kaptenas ilin, malbonigas ilian forton, ilian kuraĝon, kaj la belan liberecon, kiu donas la konscion, ke oni havas nenion por perdi. Al siaj zorgoj, ke ili ion perdos, ili oferas la kleriĝon de siaj kapabloj, ion gajni. Nur per batalo, eĉ malsukcesinta, estas io gajnebla.“

Li eltiris sian pipon, sed poste li vidis sur mia tablo kuŝantajn cigarojn, prenis unu el ili kaj prezentis al mi la alian.

„Jen, fumu, fumu en la lito. Aŭ ĉu vi jam volas ellitiĝi?“

Mi ekstaris kaj pensis: Li apartenas al homoj, kiuj ne tial sentas sin superecaj, ĉar ili pli frue ellitiĝis ol aliaj. Tio estas maloftaĵo.

Ŝolandro elkraĉis la demorditan pinton de la cigaro tra la fenestro kaj komencis fumi kiel forno sen tubo. Terura tusatako interrompis lian frazon, kiam li komencis paroli. Li gestis per mano, kvazaŭ li volus diri: Nur paciencon, vi ĉion ankoraŭ aŭdos. „Ĉu vi hodiaŭ havas ion farotan?“ fine demandis.

„Mi havas nur tiam ion farotan, kiam mi volas.“

„Bone, ni komprenas unu la alian. Mi volas nur ion fari, se mi nenion havas, tio estas tre simila al via principo. Rigardu ekzemple ĉi tiun Elkan kun sia polemika gazetaĉo, ĉu vi opinias, ke mi skribus por mia plezuro en lian revuon? Sed ĝi estas nuntempe la sola loko, kie mi povas aŭdigi min. Faras nenion, tio ja iam aliĝos.“

Li alrigardis min, kvazaŭ li volus peti signon de kredo je si. Ĉar mi silentis, li sopiris kaj deklaris sian propran kredon.

„La tempo, en kiu mi povas diri, kion mi havas dirotan en la vivo, devas por mi veni, mankis al mi ĉiam nur trankvilo kaj koncentriĝo. Pli frue estis alie, sed tiam mi males-
timis la rimedojn, kiuj estis povintaj min prosperigi. Ĉu oni povas preterpasigi sian tempon? Ĉu vi kredas tion?“

„Por tiu, kiu havas efektive ion dirotan, estas ĉiam tempo.“

„Ĉu ne vere? Vidu, vi pensas prudente, vi kuraĝigas onin. Mi ja tre ĝojas pri mia spirita abundo, sed tamen mi mian tutan abundon ne amas. Tio estas mia fatalo. Tion komprenas nur iu, kiu sin okupas per sia tuta spirita provizo.“

Emociite li rigardis antaŭ sin kaj silentis. Ofte ŝajnis, kvazaŭ lin surprizus liaj propraj pretendoj kaj kvazaŭ li estus ilin nur pripensanta, post kiam ili erupciis el li. Ĉi tiu maldelikata, kruda eksteriĝo, kun sia trivialeco, ŝajnis kelkfoje nenion scieti pri la fontoj elsaltantaj el la spirita grundo sub ĝi. Lia konscio estis senkritika, kaj ne konscia pri si mem, li pensis laŭ vido kaj sento de aliaj, kaj la mondo de fenomenoj speguliĝis en li, kvankam liaj pensoj ne povis ilin ordigi alie, ol hazarde, aŭ konsideri ilin laŭ ilia origino. Sed ĉi tiuj hazardoj havis ofte admirindan brilon.

Iamaniere mi supozis en li la tragikan spirittipon de mia tempo, sed kio lin alten levis super la ordinaraj kaj en spirito senkonsciencaj fanatikuloj de rapida efekto kaj mal-honesta patoso, tio estis lia divena emocieco kontraŭ homa animsento. Mankis al li, kiel mi multe pli malfrue ekkonis, tiu decida kapablo de spirito, kiu kreas kiel intuitiva fantazio la unuecon, sed li estis pli riĉa, ol kelkaliaj, kiuj posedas iom el ĉi tiu kapablo, kaj dankas al ĝi por kelkaj tagoj sian mizeran gloron.

La pensad-kaj parolmaniero de Ŝolandro estis karakteriza por homo, kiu estis kutimita havi kredantajn aŭskultantojn, lin ne kontrolantaj, sed kun bona opinio, kun admiro, kaj sen-
envie sin submetantaj. Nur kiu ofte estas sola, tiu lernas bone pensi, ĉar neniue estas pli malfacile konvinkebla, ol la voĉo de propraj duboj aŭ de propra kontraŭdiro. En la soleco mortas la vanteco kaj kontenteco ĉe ĉiuj sinceruloj, kaj nobla modesteco ordigas la valorojn laŭ natura leĝo de propra kapablo kaj de propraj rajtoj. Kiom da efektive honestaj naturoj lasis sin allogi al malveraĵoj kaj trograndigoj per tio, ke ili ne volis seniluziigi la atendojn de atente aŭskultantaj stultkapuloj, aŭ de senkritika publiko.

Sur nia komuna vojo tra la urbo mi fine sciigis pri la vivo de Ŝolandro, pri kiu li rakontis sen emo al senkulpigoj aŭ klarigoj. Li akuzis nek sin mem, nek aliajn, kaj metis nenian okazintaĵon en lumon por si favoran, sed li raportis kun persista preskaŭ triviala objektiveco de homo, kiu lasas al sia aŭskultanto la resumon el la aferoj. Unufoje, post paŭzo de pripensado li diris afable: „Esti devigata mensogi, ĉagrenas, se oni havas sufiĉe da fido por riski la veron, oni jam estas repacigita. Mensogi oni povas nur kun sprito, sed la humoro ĉiam aliĝas al la vero.“

Li naskiĝis kiel filo de pastro en vilaĝo kaj estis en frua aĝo edukita en fremdejo, ĉar al lia patro ne prezentigis esperoj, ŝanĝi sian vilaĝan paroĥon je urba posteno. Pri sia juneco Ŝolandro preskaŭ nenion diris, mi nur eksciis, ke lia

patrino forlasis lian patron, kaj estis post strangaj fataloj malaperinta. „El ĉi tiuj tagoj, ĝis mia dudekkvina jaro mi povas preskaŭ nenion diri“, li rakontis, „kion mi travivis restis ekstera kaj estas tial indiferenta. Mi vivis senkonscie kaj mi opinias, ke tiel okazas ĉe ĉiuj homoj ĝis ĉi tiu tempo, nur pli malfrue ili metas sencon en siajn rememorojn; kun plena konscio kaj tuta forto ni vivas nur dum kelkaj jaroj.“

Poste venis virinoj kaj knabinoj en lian vivon kaj elĉerpis ĝin ĝis la fundo de liaj jaroj. Li ne parolis pri unuopajoj, sed el liaj rezervaj aludoj evidentiĝis, ke ĉi tiu pala fluondo lin tute portis kaj fine lin flanken ĵetis de la celo de lia vivo. Li parolis kelkfoje mallonge kaj ĉiam sen fanfarono, la tono kaj la zorgema singardo de liaj aludoj donis al ĉio rebrilon de preskaŭ malĝoja vereco. Li rakontis pri aferoj, kiujn neniue povas elpensi, sed lia natura takto, kiu lin ĉiam apogis, kiam li estis serioza, malhelpis lin fariĝi melankolia, aŭ konfesi malinde sian subiĝon. Tiel okazis, ke kelkfoje fariĝis liaj vortoj kruela moko pri si mem, li ja evitis fiparoli pri virinoj, sed ekzistas ja aferoj sur ĉi tiu teritorio, kiujn en la memoro, eĉ ĉe bonaj intencoj oni ne povas emfaze pri-trakti, se oni estis ligita al ili senpartoprene, kaj sammaniere oni al ili repensas.

„La virinoj sekvis unu la alian en mia vivo, kiel ĉe poŝtiĝeto, estis terure. Komence mi opiniis esti partoprenanta en ĉiu kazo kun tuta amo, kaj miris nur iom pri mia malpersisteco. Kiun rolon ludis ĉe tio mia vanteco, tion mi ne povas diri, kiu ja povas precize ekzameni laŭ ilia mezuro la reciprokajn efikojn, per kiuj sin montras la pasio? Estas certe, ke mi efektive konsideris la virinojn tro serioze, kiel ajn ne kredeble ĝi ŝajnis, tro serioze en certa kaj sendube en falsa senco. Mi kredis pri ĉiuj ion realan, rilatantan al mia animvivo, ion kio ili devis esti, kaj mi ne vidis pro tio, kio ili estas. Kiel ili faciligis al mi, esti kun deco malinda, kun indo malfidela kaj kun sin mem estimo malbona! Ili instruis al mi, konsideri la ĝuon, kiu per ili doniĝis, kvazaŭ mian ĉefan rajton, kaj ili

girlandumis min kiel venkinton, post kiam ili min subigis. Baldaŭ mi estis pli firme en la katenoj de ĉi tiu vivadformo, ol ke mi povis esti savinta min, el sia malfeliĉo oni liberigas sin pli facile, ol el sia fatala feliĉo. Tiamaniere mi perdis mian vojon en la mondon. Tiam mi estis studento, kaj restis ĝi, kiam mia patro mortis kaj liaj helpdonoj ĉesis. Preskaŭ ne videble mi komencis preni de la virinoj, kion mi bezonis por mia vivtenado. Per multe pli da ĉarmo, takto kaj memkompreneblo povas virino nutri sian viron ol male. Virino, kiu sin mem donas, donas ankaŭ ĉion alian, viro regule opinias, ke li per sia persono donis jam tro multe. Tiel prokrastiĝis miaj studoj kaj mia laboro. Kvankam mia kapo estis ĉiam plena de projektoj, sed por senzorgaj virinoj, kiuj vivadas en ĝuo, estas projektoj de l'viro pli agrablaj, ol agoj, ĉar projektoj ne fortiras lin de ili. Mia memfido estis tiel kompleze nutrata kaj kontentigita, ke cetere agoj estis superflujaj. Mi proklamis per gravaj vortoj, kion mi intencas fari, kaj mia ĉambro estis plena de incenso, validanta por la perfektigo de mia faro, antaŭ ol mi estis komencinta. Mi rigardis la belan, severan, helan mondon de agoj el lito kaj vi ne kredas, kiel rapide ĝi, rigardate el tie, transformiĝas en vatobulon. Kaj tamen kelkfoje estiĝis al mi io bona, mi pensis esti artisto. Mi travivis akrajn horojn de reveno al mi mem, sed mi estis tro dorlotita, por ne atendi de la arto, kion virinoj al mi prezentis. Sed ĝi dorlotas nenion, ĝi estas virino, postulanta fidelecon, feran koron, malvarman kapon . . .“

Li hezitis kaj silentis longe. Fine li diris simple :

„Kie ili ĉiuj restis? Nur unu eltenis ĉe mi, vi vidis ŝin hieraŭ. Ne mia plendinda valoro restadigas ŝin ĉe mi, sed la ŝia. Mi povis ekbruligi la animon kaj sangon de virinoj, sed eĉ ne unu mi povis firmiteni longe. La bona Dio scias, kio ilin ĉiujn pelis al mi, mi estis nek bela nek riĉa. Ofte mi kredis, ke mia malbona famo kaj miaj vivspertoj devus ilin fortimigi. Sed estis ĝuste male. Ĉu oni ne devus kredi, ke por virino

ekzistas nenio pli malbona, ol posedi kune kun aliaj unu viron, aŭ esti havanta multajn antaŭulinojn? Estas ĝuste male. Okazas al ĉispecaj virinoj tiel, kiel al abeloj ĉe taso da mielo, unu trovas ĝin, kaj post mallonga tempo estas ĉiuj tie. Regule virino malestimas iom la viron, kies sola amatino ŝi estas, ŝi ne sufiĉe alte ŝatas sin mem. Estas ankaŭ ia miksaĵo de scivolo, envio kaj vanteco en la esenco de virino, kontraŭ kiu nenia karaktero gardas tute. Estas eble ĉi tiu inklino motivita per ŝia simpla naturo, eble ĝi estas konsekvenco de ebrieco, senviveco kaj unuflankeco de viroj de nia nuntempa profesia vivo. Kiu volas tion decidi? La naturo ludas sensente, ofte kruele kun ĉiuj, kiuj ne havas la forton, stariĝi kontraŭ ĝi frutempe kun la volo al ekkono, aŭ estas de ĝi prenataj per graco de l'amo en ĝiajn patrinajn brakojn. Por mi fariĝis klara, kiel mi min lasas misuzi, post kiam mi pro ĉi tiu misuzo ne plu sentis ian specialan plezuron; mi lernis koni miajn fortojn, kiam mi ilin ne plu havis“.

Ni sidigis nin sur la herbejbordon de rivero, rapidanta al la urbo, kiun ĝi trafluis. Tiu kuŝis en la maldensa haladzo de l'varma somertago kaj ĝiaj turoj, kvazaŭ simboloj de multaj jarcentoj, prezentis bluan songobildon, sanktigitan per malproksimo kaj antikveco. Ŝolandro eltiris sian pipon, kaj ekfumis senparole, li ridetis kun esprimo de spito kaj senkonsileco kaj alrigardis la fluantan akvon. Silikarbetoj havigis al ni ombron, sur la transa bordo staris paŝtisto inter aro da paŝtantaj ŝafoj, kaj lia hundo transflaris al ni. Ju pli longe mi observis la vizaĝon de Ŝolandro, des pli precize mi komprenis, ke ĉi tiu sensentemiĝinta koro, plena de vivo kaj senpripensa, sencela forto, povis plenigi la animon de virinoj kaj knabinoj kun suferanta espero, patrina kompato kaj blinda ardo, ĉi tiu treege incitebla sentimento, ĉi tiu laŭta gajeco kun forto, emocio de ĉiuj sentoj kaj ĉi tiu tiraneca knabeco plena de aroganteco kaj fidelkoreco. Mi komprenis la danĝeron, povanta estiĝi por virinanimoj en la rebrilo de ne reala kaj tamen ne refutebla spirita energio, kiu fortiregas la ne firmajn

naturon de ĉiuj malpersistaj inter ili en tiun ŝanceliĝon inter amo kaj helppretemo, al kiu ili oferas sian korpon.

Sed kiel kruele ili venĝis siajn seniluziigojn! Mi sentis kun kolero kaj kompatado, ke ĉi tiu spirito neniam plu povus sperti reviviĝon, ke ĝiajflugiloj estas rompiĝintaj, ĝia brilo malklariĝinta kaj ĝia vojo plensutata per ŝtonamasoj. Ŝolandro subite alrigardis min, kvazaŭ miaj pensoj vekus lian malesperecon.

„Ni volas iri, frato“ li diris profunde spire kaj mole „kaj kuraĝe iom trinki. Mi konas arbaran trinkejon en la proksimo, ĉe kies vido vi forgesos virinon kaj infanon. Al Diablo, duobla sento de naŭzo devas esti forigita, tiu post la hieraŭa drinkado kaj tiu, kiun kaŭzis mia hodiaŭ-matena babilaĉado. Ĉu vi volas veti kun mi, ke mi ambaŭ neniigos?“ Li atendis mian respondon, dum ni antaŭenpaŝis. Ĉar mi silentis, li daŭrigis: „Vi partoprenas, tion mi ja devas konsenti, sed ĉiam kiel gasto. Kion malhelpas vin, sindoni vin? Mi ne scias, ĉu mi vin enui, kelkfoje mi pensas, ke mi povus vin malami. Ĉu vi ektimas? Ne faru tion, vi spertos de mi nur fidelon, mi ankaŭ komprenas, ke vi eble atendas, ĝis estos ĝi tute subiginta vin . . . do, Dio kun vi, ne koleru pri mi“.

Mi premis lian manon, kaj batalis perforte kontraŭ mia emocio. La spirito de Teja staris antaŭ mi, kaj diris al mi: „Via mano elglitas, antaŭ ol oni ĝin bone tenas“. Ĉu ne estis la sama demando kaj akuzo en la vortoj de Ŝolandro kaj en la ŝia, tiu ne klarigebla dezirego al bonfaroj, kiuj portas kun si la oferon de unu, nome de l'sankta postulo. Ĝi minacis mian tutan junecon, kaj embuskas la junecon de ĉiuj riĉuloj, kvazaŭ loganto en pastra vesto. Sed la vortoj, kiujn Ŝolandro aligis al sia riproĉo, kiujn Teja ne sentis, estis la unua vera konsolo por mia vivo, estis hela lumo.

La arbara trinkejo, en kiun min Ŝolandro kondukis, trompis la atendojn, kiujn li vekis en mi. La malnova domo staris sub fagoj en malkulturita ĝardeno, plena de verdaj anguloj kaj laŭboj, la parkaĵoj transiris laŭ plenkreskataj vojoj iom post iom en la arbaron. Cie brilis la silenta ora lumo de

l'suno en la verdaĵo, kokinoj moviĝis inter la tabloj kaj sur la tegmentsupro mi vidis gaje enloĝitan kolombejon. La mastrino salutis Solandron per triviala konfidencio, kio ŝajnis esti al li malagrable, kvankam li certe ĝojis pri ĝi. Ni elektis dense plenkreskatan de verdaĵo laŭbon ĉe la arbarrando kaj tie ni sidigis nin, en malvarmeta somerodoro, por ne plu ekstari ĝis noktiĝo.

Ree vekigis per la vino la fermentanta spirito de Ŝolandro, kvazaŭ al dua kaj alia vivo, li tute senĝenigis min kaj mi ektimis pri tio, ke ĉi tiu viro, kiun mi konsideris bedaŭrinda, kaj kiun mi jen timis, jen admiris, instigis min al konfeso, kiujn mi faris al mi mem la unuan fojon. Sed ekzistas nenio pli raviga, ol nobla malavaremo, kaj Ŝolandro akordigis mian animon al tute nova senbrida kuraĝeco, kaj al feliĉiganta indiferenteco kontraŭ ĉio, kio ne kuŝis en la sfero de ĉi tiu arda ĝuo de sinestimo kaj espero.

Ho, vi mallonga, bela tago de mia juneco! Mi trinkis el a pokalo de Ŝolandro la antaŭguston de plenumiĝo, kiun mi ne konis, la vivsuferon de miaj estontaj bataloj sen nomo, kaj la antaŭsenton de l' morto, kiu al junulo pli agrable gustas, ol la plej fajra vino, se li ĝin sentas en komuneco kun la abundo de l' vivo. En ekscitiga reciprokeco de kontraŭdiro kaj fido mi aŭskultis la iluzion kaj ekkonon de Ŝolandro, lian doloron kaj lian kredon.

Estis jam la luno, kiu lumigis al ni, kiam li diris, pezhumore kaj malĝojpene:

„Unufoje, kiam mi estis juna, mi skribis mian plej bonan verkon, vi povas ĝin trovi en iu de miaj tirkesto, aŭ eĉ ne plu. Neniu volis havi ĝin. Ne nomu min malforta, ĉar mi rezignis laŭ tio vivi. La vivo logis min, la fratoj kaj fratinoj, la interesiĝo de multaj, la rapida amo, la ĉiutaga varmo, kaj tiel mi fariĝis tia, kian volis la plej proksimuloj. Nur ne diru, ke tio estis nenio alia, ol malforto. Kuŝas terura potenco en la pretendoj, kiujn nia tempo direktas al ni, kiom multaj estas oferoj de tia tempo, kaj la oferoj de l'tero estas efektive la

plej bonuloj. La plej grandaj spiritoj de ĉiuj epokoj povis ja doni sian plej malmulton, kiom ajn nobla ĝi ŝajnis al ni, sed sian plejbonon ili kunprenis kun si, ĉar neniuj ĝin pretendis. La estiĝo de perfekta verko premisas perfektan mondon de pretendo, kuraĝigon el la ĉielo, tial la plej eminentuloj ne kreis verkojn, ili malhavis kaj kredis . . . se vi ne plu komprenas min, iru al Diablo!“

Li skuis sin kaj trinkis.

„Solecaj ni estas, kiel bestoj.“

„Kaj tamen ni estas la loĝejo de l'amo.“

„Vere, vere,“ respondis Ŝolandro pli trankvile kaj rekuragiĝis al siaj pensoj, sed li ne plu trovis ilin. „Ĉu estas necese, ke vi tion diru al mi? Kiam vi tion aŭdis de mi? Sed la koncedo malbonigas nin. Se ni ne faras koncedojn, tiam ni ja povas pereji, sed neniam malboniĝi. La kompromiso malbonigas nin, la indiferenta mezo, ĝi estas la kaŝa epidemio de l'homaro, la malbrila krepusko de l'animoj, nek tago nek nokto. „Sed ĉar vi estas indiferenta, mi vin elkraĉis el mia buŝo“ kie ja staras la grava diro? En Johannes, kompreneble, li antaŭsentis plej profunde, kio okazis, la plej klare, kiam li meditadis. Ni estos ĉiuj elkraĉataj.“

„Mi ne faras kompromisojn“, mi diris.

„Ne parolu. Kompreneble vi faras neniajn, ĉar vi faras entute nenion. Atendu, ĝis vin kaptos la ambicio, ĉi tiu fajro, kiu estiĝas, kiam Dio kaj Diablo luktas en ni. Atendu kaj rigardu. Eble ĝi kaptos vin je iu tago, tiam vi pensu al Ŝolandro. Mi faris kompromisojn, sed mi havas unu konsolon, mi scias ke mi tion faris. Ofte mi opinias, ke ĝis tiam ne estas ĉio perdita. Mi mem, mi estas kompreneble perdiĝinta, sed ankoraŭ ne ĉio, ĉu vi komprenas tion? Mi volas diri, ke mi kredas ankoraŭ . . .“.

„Mi komprenas vin kaj scias, ke estas multe, kion vi diras pri vi.“

„Eble ĝi estas ĉio. Tion mi ne scias. Sed ofte, kiam mi sentas, kvazaŭ mi senkonsciiĝus pro malĝojo, ekheliĝas en mi

kvazaŭ fremdspeca lumradiaro, kaj mi imagas al mi, ke ĉio dependas nur de kredo. Tiam estas al mi, kvazaŭ la kredo estus la mistika senco, la eterna animo de tio, kio signifas la savon. La kredo en ni estas io, kvazaŭ Dia ago por nia ago. Oni devus estimi la kredon, kiel oni estimas la amon, pro ili mem kaj kiel forton, sed ne laŭ ĝia valoro aŭ laŭ la vereco de ĝia objekto. Dio, kiel mi lin en mia mizero ofte imagas, demandos neniun: „Ĉu vi kredas je mi?“ Li demandos: „Ĉu vi kredas?“ Kia profunda gajeco, kia vera feliĉego devas ravi animon, kiu simple kaj sen dubo povus respondi al ĝi: „Jes, mi kredas“. Kvazaŭ kredo estus afero de certa konvinko! Kredo estas la koro de vera pieco, la sanstato de fortaj animoj, kredo estas la eterna jeso.“

Li estis subite skuata, kvazaŭ el interne. Li ekprenis la glason, kiel apogilon, sed li renversis ĝin kaj faligis la manon. La peza kapo antaŭen kliniĝis, kaj lia buŝo grimaciĝis, kiel ĉe infano batalanta kontraŭ larmoj. —

La mastrino bonanime proponis al ni, ke ni enloĝigu nin en la domo. Ŝolandro ŝanceliris sur la lunmakuloj sub la arboj, kiel senforma fantomo, kaj kantis laŭte. La nokta arb-aro eĥis ĉi tiujn tonojn, sonantaj kiel malĝoja kriego de besto. Mi ricevis fojnokuŝejon sur la fajrujo de malgranda bakejo, en kiun tra rompita fenestrovitro enfalis la lunlumo. La mondo estis graveda kaj meze en ĝi kantis cikado per patrino voĉo. Mi rigardis per vaste malfermitaj okuloj en la silentan lumon kaj la konscio de mia vivo plenigis min per deliro de melankolia scivolo. Mi ekvidis, duonsonge, lulilon balanciĝantan sub hela stelo, kvazaŭ ŝvebantan. Ĝi moviĝis malrapide laŭ melodio de turmentplena kaj dolĉa kanto, de poluso al poluso de l' mondo de niaj tagoj. La polusoj estis jen Eros, jen la evangelioj, kaj en la neeldirebla espero, povanta peri vizion, mi antaŭsentis, ke iam, kiam ĝi estos trankviliĝinta, estus elpaŝonta el ĝi nova Dio, kun gajaj trajtoj de saĝa kaj bona homo.

* * *

La posta tempo okazigis, ke por renkonti Solandron mi estis vizitanta la gastejon de Kalaŭer kaj fariĝis tie ofte vidata gasto, kvankam mi Ŝolandron malofte renkontis tie, kaj preskaŭ ĉiam en societo, kiun mi malmulte ŝatis, kaj ree, post tagoj de disiĝo, mi trovis lin, reveninte vespere hejmen, aŭ matene forironte, ne atendite en mia ĉambreto. Serĉante lin unufoje en lia loĝejo, mi renkontis tie anstataŭ lin tiun silentan virinon, kiu en nia unua nokto, kaj en kelkaj postaj same, estis lin atendanta. Ni interŝanĝis kelkajn vortojn, ŝi respondis al mi indiferece kaj afable, sed ŝiaj okuloj ne enlasis en sin la fremdan rigardon, kaj mi forlasis ŝin kun la konscio, ke mi ne nur estas indiferece al ŝi, sed eĉ ke ŝiaj okuloj perceptis min sole kiel iun objekton. Alian fojon mi provis paroli pri Ŝolandro, pretekstante komunan zorgon pro lia bonfarto, ne kaŝante mian inklinon por li. Ŝi alŝovis al mi seĝon, sidis silente por si mem sur la litrando kaj aŭskultis min atente, sed ŝia inteligenta, krome ne tre bela vizaĝo ekvigligis nur, se aŭdiĝis bona kaj laŭdeganta vorto pri la viro, kiun ŝi amis kaj al kiu ŝi servadis. Min kaptis la unuanfojon antaŭsento pri la malofta eksklusiveco, laŭ kiu ŝi vivis nur por li kaj nur en li, ĝis pliposte klarigis al mi la mallonga historio de ŝia vivo la bildon de neforgesebla sindono kaj senlima oferemo. Sed ŝi mem nek parolis pri si kaj pri sia sorto, nek pri li, kiu ĝin kreis al ŝi. Ŝajnis ekzisti por ŝi nek vivo nek homoj en la mondo, sed nur okazoj por fari aŭ suferi ion por Ŝolandro. Ĉi tiu oferado de sia tuta persono kaj de ĉiuj siaj rajtoj estis pura kaj elkora, sed sen gajeco, la lumeto de ŝia dolora feliĉo flagris sub la malhela nubo de l' proksimiĝanta katastrofo, ŝvebanta super la vivo de Solandro. Tio donis al la forto de ŝia fideleco ian neeldireblan malĝojon, ĉar ŝi vivis kaj ekzistis sen espero. Ŝia kritiko pri ĉi tiu viro estis tute nuliĝinta, ĉar ŝi ne povis ĝin akordigi kun siaj sentoj, kaj kun la devoscio de sia simpla sed obstina naturo, kaj la konflikto verŝajne estus detruinta ilin, se ŝi estus okupiĝinta per ĝi, ĉar ŝi havis prudenton kaj karakteron. La

karaktero de Solandro lasis al ŝi nenian eblon, krom blinda konsento, aŭ disiĝo, kaj ĉar ŝia amo ŝajnis poste esti ekkoninta lian dependecon de ŝi, sekve ŝi fariĝis el riproĉata, malestimata kaj trompita amatino pardonema kaj tolerema fratino.

Tial mi ne miris, ke ŝi lin ornamis per la floroj de sia malrespektata valoro, kaj ke ŝi lin laŭdegis, por esti pravigita antaŭ si mem. Mi ekkonis iom post iom en ŝiaj trajtoj la por mi novan kaj nekompreneblan karakterizan signon de virina sufero, kiun la vivo neniam ĝis nun montris al mi, mi komprenis, ke ŝin neniu amis, kaj ke ĉiuj, kiuj parolis pri ŝi, faris tion kun rideto, kiu min samtempe koleris kaj kontentigis, jen ŝi ŝajniŝ al mi ĉirkaŭata per glorkrono de sanktulino, paŝanta ĉe l' flanko de krimulo, jen mi pensis, emociite de kompatato kaj malestimo, pri seninda humileco. Sed ŝi mem iris, en dolorplena revstato, sen rideto kaj sen larmoj, la al ŝi destinitan vojon, kaj aŭdis nek averton, nek riproĉon nek laŭdon.

Ŝi estis filino de riĉa fabrikanto kaj konatiĝis kun Ŝolandro en liaj plej bonaj jaroj de forto kaj espero. Estis inter ili aĝdiferenco da dek jaroj. Iom post iom ŝi oferis sian tutan havaĵon. Si vidis ĝin disflui, sed ŝi neniam kontraŭstaris, ĉar ŝi estis neniam kapabla aligi eĉ ŝajnon de dubo al sia kredo pri valoro kaj forto de sia amato. Ŝi koncedis al li rajton, kontrastantan al ĉiuj leĝoj de humaneco kaj moralo, ŝi vidis ke aliaj virinoj ĝuas la profiton de ŝiaj oferoj, silentis, toleris ĝin pro li, kaj oferis fine sian lastan havon. Persista certeco donis al ŝi forton, ŝi sentis, ke fine li restus la ŝia, nur la ŝia, ŝi rigardis kun lasta espero lian senhelpecon, kaj ŝi konsolis sin per sia kapablo povi labori por li, kiam ĉiuj estos lin forlasintaj.

Mia interrilato kun Solandro konsekvencis, ke mi ŝin poste pli ofte renkontis. Kiam mi estis konanta la historion de ŝia vivo, ŝanĝiĝis al mi malrapide ŝia bildo, kaj emociita per la kvieta, suferoplena brilo en ŝiaj okuloj, mi pentis pro

kelkfoja dubo pri ŝia indo kaj fiero. Kiom malmulte prezentas al ni la vivo, se ni komparas la tradiciajn mezurojn de valoro, virto, justeco kaj boneco kun ĝia potenca, miloble diferencanta esenco! Ĉion malakcepti, ĉion, devus esti la vivkomenco de l'sana juneco, kvazaŭ al puraj, fortaj koroj tamen ne evidentiĝus ĉiam la efektiva valoro! Ĝi kuŝas en ili, kiel laodoro kaj koloro de floro en ĝia burĝono, kaj ilia sentimento aliĝas sammaniere al bono, vero kaj noblo en la mondo, kiel la lumo de l'suno al la malfermiĝinta florkaliko, turnanta sin al la bezonata heleco, kiu sin donas al ĝi kaj kies verko estas ĝia beleco. Nur la kredo al la laŭleĝeco de ĉi tiuj interrilatoj garantias al ni neŝanceliĝantan memkonscion kaj homindon, sendependan de nia sorto.

Hodiaŭ mi vidas en la reflektado de miaj rememoroj la bildon de tiu virino, liberigita de ĉio, kion iam la estanta ĉiutago amasigis sur ŝin je polvo kaj rubo. Ŝi iris sian vojon, kvazaŭ sur tapiŝo el dornoj, la tapiŝo nomis sin Ŝolandro, ĝi portis ŝin, donis al ŝi vivon, kaj vundis ŝin, sur ĝi ŝi volis unutagon morti. Ŝi konis nek danĝeron nek ĝojojn, nur lin, ŝi vidis nek homojn, nek Dion, nek ĉielon, nur lin. Kiam ŝiaj okuloj redirektiĝis de lia diboĉula vizaĝo en senpensema indiferenteco al la formoj kaj figuroj de l'ĉirkaŭa mondo, tiam ŝajnis al mi, kvazaŭ ili dirus: tia estas ja nu la eco de ĉi tiu viro, al kiu mi apartenas per mia amo. Ĉu vi lin nomas bona aŭ malbona, riĉa aŭ malriĉa, admirinda aŭ malmorala, tion mi ne aŭdas kaj ne scias, ĉar mi nomas lin mia amo kaj vidas lin tia, kia ĉi tiu estas. Por ĉi tiuj kelkaj mizeraj tagoj de mia surtera restado, kial mi ne lasu lian individuecon tia, kia do li ja estas. Ĉu mi faris ion por li? Miaj agoj estis kiel miaj spiroj, ili estis necesaj al mi por vivi, kaj vi devus min nek laŭdi nek riproĉi. Se vi diras, ke mia vivo estas mizera kaj bedaŭrinda, tiam vi ne vidas mian koron. Mi scias, ke unu tagon, trankviliĝinte pri la spiritoj de lia cerbo, li kuŝos sur sia mortlito, firmigite kontraŭ tera adiaŭo per paleco kaj malvarmo, en paco. Kiel mi povus elteni ĉi tiun rigardon,

se estus restinta iom ŝuldata de mi al mia amo. Ĉu li estas kulpa pri si mem kaj pri la mondo? Kiel feliĉa mi estas, ke ĉi tiu demando okupas nur vin kaj neniam min, koncerne min li neniel estas kulpa, ĉar li amas min malpli ol mi lin. —

Unu neforgesebla vespero, kiun mi baldaŭ post mia iro ekster la urbon travivis kun Ŝolandro, malfermis al mi novan percepton sur la suferadon de ĉi tiu stranga virino, sed samtempe mi lernis pli bone, ol antaŭe, kompreni, ke tiu ĉi viro, kiu estis la kaŭzo de ŝia akra sorto, tamen meritis laŭ sia esenco tian inklinon kaj sindonon.

Estis jam iom malfrue, kiam mi ree iris al Kalaŭer. Pro la ankoraŭ sufoka posttaga varmego estis la pordoj kaj fenestroj vaste malfermaj, mi aŭdis jam tondri la voĉon de Ŝolandro, kiam mi estis preterianta la fenestrojn. Li sidis kun du junuloj kaj unu publikulino ĉe la kutima tablo en la angulo kaj predikis al ĉi tiu moke entuziasmigita aŭskultantaro konfuzan litanion pri praktika vivofilosofio kaj mistika sensencaĵo, pro si mem suferante kaj tamen avide ensorbante la entuziasman miron de sia malgranda rondo. Mi konis liajn erupciojn de profana efektemo kaj vanteco kaj sidigis min heziteme al lia tablo, sciante, ke en tiaj momentoj mi estis malbonveninta al li. Li absolute ne povis meti niajn interrilatojn sur la saman nivelon, sur kiu li estis serĉanta komunicon kun siaj kunuloj, kaj li hontis pri ili en mia societo same, kiel okaze de ilia ĉeesto li ne volis konfesi sian rilaton al mi. Miaflanke, mi neniam kaŝis mian abomenon kontraŭ liaj ĉi tiuj specaj kamaradoj. Mi per certe troigita klareco ne atentis ilian konfidemon, kiu ĉe tiaj homoj montras sin nur tiam kontentigita, kiam ili estas malsuprentirintaj sian oferon en la trivialecon de l'propra vivmaniero. Precipe mi sentis la malamikecon de ne plu juna, tre inteligenta litografiisto, kiu tre ofte estis kun Ŝolandro, kaj kies humila kaj ruza maniero trouzi amikon por sia profito, kolerigis min. Li apartenis al tiuj homoj, ĉe kiuj mi post la unua rigardo estis certa, vidi antaŭ mi malamikon de mia vivo. Ekzistas personoj, kiuj nep-

re reprezentas tion, kio estas la neantaj kaj detruaj elementoj de nia estado, kaj niaj instinktoj ribelas kontraŭ ili, ofte antaŭ ol estas interŝanĝita eĉ unu vorto. Ne ekzistas vojo, nek rimedo al repaciĝo, kaj ĉiu provo al kompromiso estas malpura.

Pli abomena, ol ĉi tiu viro, estis tamen al mi la knabino, kiun mi samofte vidis en lia societo, kiel ankaŭ en tiu de Ŝolandro. Ŝi estis de ĉiuj nomata simple Jona kaj estis ĉio pli ol bela, sed ŝi estis tre saĝa kaj de tia ekscitiga vigleco, kian al la karaktero de tre talentaj knabinoj ofte donas la senbrideco de malvirto. Ŝia malboneco havis malĝojan kaj malvarman grandiozecon, nenia movo de ŝia pereinta sento trapaŝis plu la afekciojn de ŝia volupto kaj la ŝanĝigantajn putradkolorojn de ŝia degenero. Kun senkonsila timego mi vidis, renkontinte ŝin la unuan fojon, en la klarajn abismojn de ŝia malkaŝita honto, kaj mi komprenis, ke virino povas kun malfermaj okuloj kaj veka sento, kun rido malsupreniri la ŝtupojn de l'infero ĝis la profundo, kiun viro neniam atingos sen teruriĝo.

Efektive ŝi apartenis al ĉiu kaj al neniu, sed speciale al Ŝolandro kaj al tiu litografiisto, kiu ŝajnis ŝin interesi, ĉar ŝiaj instinktoj estis al li intimaj kaj proprecaj, dume ŝin al Ŝolandro ligis ia, kvazaŭ spirita ambicio, ia pasio por multkapablo, kia ĉe senkoraj virinoj troviĝas rilate al geniaj viroj. Ŝi malestimis lin kaj samtempe ŝi estis fiero pri la respekto kiun li kaŭzis al ŝi. Mi observis tiam la fatalon de ĉi tiu obskura komuneco triopa, nur laŭ timiga antaŭsento, ĉar emo kaj malemo malklarigis mian prudenton, sed poste mi komprenis la malestimon kaj malamon, kiuj devas esti en la animoj, ĝuste pro ĉi tiu rivaleco, kiu ambaŭflanke evoluigis, ne en nobla pasio, sed jen per grandanima superstiĉo, jen per celkonscia malhonesteco.

Ekzistas en ni cirkonstancoj, en kiuj la inklinoj de nia naturo refutas ĉiun averton de l'prudento, ilia el la profundo venanta trudo malhelpas ĉiun singardon de l'spirito, kaj ni ekkonas nek la originon nek la danĝeron de nia ago. Subite mi diris laŭte:

„La gastejo de Kalaŭer estas porkostalo“.

Ŝolandro, kiu min tuj komprenis, suprenrigardis tuŝite, lia kamarado turnis sin malrapide kaj spionrigarde al mi, kaj dum la helaj, malklaraj okuloj sub ruĝetaj brovoj estis min observantaj, li respondis malvarme kaj arogante:

„Tial ĝi vin allogas“.

Jona ekridis incitige, sed ŝi diris repacige:

„Lasu do, lin turmentas la moralo. Tion ĝi faras al ni ĉiuj, ĝis kiam ni estas resanigitaj“.

„Aŭ putriĝintaj“ mi diris, kaj estis preta al interbato.

Ŝolandro sciis, pri kio temas. Li ekstaris, laŭte kriegante kiel urso:

„Silenton! Neniu diru eĉ unu vorton plu, ĝis kiam mi staras ĉi tie“.

„Jen, sidigu vin“, diris la alia simple.

La unuopaj gastoj alrigardis nin de siaj tabloj, Kalaŭer peze altrotis, lia kapo malsuprenpendis kaj liaj malklaraj okuloj oblikve alrigardis nin de malsupre. Ŝolandro alparolis neniun, sed li turnis sin al la aliaj kaj ŝirmis min per sia larĝa dorso, ne sciante, ke per ĉi tiu pozicio li prenis mian partion.

Jona leviĝis neglekte.

„Ĝi estas enuiga, kaptu viajn grilojn sola kun via Jonathano, mia maljunĉjo“. Ŝi fortiris kun si sian amikon kun singarda decideco de ĉiam antaŭvidanto, sciante precize, ke skandalo povas kaŭzi al ŝi malprofiton. Oni sekvis ŝin, kaj la societo forrapidis, mia kontraŭulo pli indifere, ol ankoraŭ kolere. Estis por li nenio plu gajnota, ĉar la knabino iris kun li. El la pordo li vokis al Ŝolandro trankviligan salutvorton. Nur nun mi koleriĝis, estis al mi, kvazaŭ mi estus farinta ion maljustan, kaj nun ne trovis vojon por ĝin rebonigi. El ekstere mi aŭdis la malrespektan ridon de l'forirantoj, ĝi enpenetris kun la nokta aero al ni kaj ekssonis kun la paŝoj.

„Vi pereos“ mi diris al Ŝolandro, „vi forĵetas vin. Ĉi tiu virino estas kloako“.

„Vi estas filistro“ li respondis kolere.

„Se vi nomas ĉion filistra, kio ne estas malpura, tiam mi estas filistro“.

Furioze li ekkriis, sed li moderigis sian voĉon:

„Ĉu vi volas prediki moralon al mi? Kiom vi scias pri la mondo, kiom vi komprenas de rilatoj de fremda animo al aferoj, estantaj al vi malagrablaj. Temas nur pri tio, kion mi sentas, ne pri tio, kiom la objekto valoras, per kies iniciato mi ĝisvivas“.

„Ankaŭ mi parolas nur pri tio, kion mi sentas. Kiom mi scias, tio estas indiferenta por mi, sed mi scias, kion mi malestimas kaj malamas, kaj kion mi admiras kaj amas“.

„Iru al Diablo vi babilulo!“

„Bone. Mi iras. Fartu bone!“

Ŝolandro ekstaris kaj kaptis mian brakon:

„Kial vi volas tuj forkuri, vi stultulo, se mi modeste eldiras mian opinion? Tion mi ja ankoraŭ rajtas, ĉu ne?“

„Ĉu mi ne?“

„Kompreneble, ankaŭ vi, kiel disputema vi estas. Venu, sidigu vin, ni parolos. Mi retenas vin, ĉar mi devas paroli, mi pereas pro malĝojo, se mi ne povas senkulpigi min ĉe mi mem. Nur friponoj, estante solaj, povas tion fari al sia kontentigo, sed ne mi. Tuj, kiam vi estus forlasinta min, mi pensus, ke mi faris maljuston al vi. Do aŭskultu min. Ne, kvazaŭ mi kredus je mi, se mi estas vin persvadinta, mi eĉ ne havas la deziron kredi min mem, sed mi spertas nur, kiel staras mia afero kaj kiel mi pensas, se la kontraŭdiro elpelas la anĝelojn kaj rabobestojn en mi el iliaj kapeloj kaj kavernoj. Vi komprenas min, ĉar vi ridetas. Ha, kredu, ke estas ia strangaĵo, je la efiko de malbono sur min. Ĉu vi volas, ke mi konfesu, ke ĉi tiu virino estas malpura virinaĉo? Ne, tion

vi ne volas. Estas vere, ke ŝi vekas en mi la malbonon kaj malnoblon, la kondamnindon, la honton, kaj miaj renkontoj kun ŝi estas miaj degradiĝoj. Ŝia karaktero signifas tiun duban elementon en la mondo de viroj, pri kiu la homaro silentas, kvazaŭ laŭ sekreta interkonsento, mi ne volas decidi, ĉu prave, ĉu malprave, sed estas certe, ke ĉi tiu silento furiozas inter la homoj, kiel lupo en ŝafvesto inter brutaro. La yundojn de ĉi tiu silentado oni vidas ĉie en la mienoj de virinoj. Sed nun aŭskultu kiel staras mia afero, kaj kion mi ĝisvivis.

Estis ĉiam post tagoj de tiaj degradiĝoj, ke vekiĝis en mi, kvazaŭ post puriĝo, la voĉoj de anĝeloj. Se la korpo falas, suprenleviĝas la animo, tion vi ĉiuj ankoraŭ ne scias, kvankam vi ĝin en alia formo ĉiutage asertas, ekzemple kiel post morto. Sed estas tiel ankaŭ jam en vivo. En la zorgo pro sinmem konservo ni ne altigos la animon, eĉ la malpleje al ago, ĉar ĉe bonfarto de l'korpo ĝi forgesas siajn flugilojn. Per ekzisto de paseblaĵo estas asekurita nur la estiĝo de paseblaj havaĵoj, sed la animo havas intimajn rilatojn al la perejo de l'korpo kaj levas siajn flugilojn nur post la ventego de l'disrompiĝanta surtera realeco, aŭ en la malĝojo, reganta la ruinojn de l'paseblo.“

Li ĉesis paroli kaj alrigardis min. Liaj okuloj brilis, kaj kiel ĉiam, kiam li parolis en vera emocio, mi estis sensave kaptita de lia spirita vivo. Kun timo kaj amo mi rigardis en liajn helajn okulojn, brulantaj sur la suferadejo de lia vizaĝo kiel du lumoj en marĉo.

Sajnis kvazaŭ li estus al si mem parolanta, kiam li daŭrigis malrapide:

„Multaj homoj ekzistas, al kiuj el ilia malsano, ilia mizero, ilia honto estiĝis Dio! Dum kiam ili estis sanaj kaj puraj, ili nek konis, nek serĉis lin. Ofte mi pensas al la vortoj de Kristo: „Sed mi diras al vi, ke vi ne kontraŭbatalu la malbonon.“ Vi ĝin certe ne konas, same kiel la plej multaj, ĝi estas en la surmonta prediko. Certe en konkludo kun liaj

vortoj ĝi signifas, ke al tiu malbono, kiun ni spertas. Ĝi estas admono al toleremo kontraŭ aliuloj. Sed kiel la plej multaj vortoj de Kristo, ĝi havas krom sia praktika senco ankaŭ sekretan valoron de komuneco kun la homeco laŭ sia pura spirita formo. Se estus bone sur la tero, neniu sopirus sian patron en ĉielo, ĉu vi komprenas koincidon de malbono sur la vojo de l'animo? Ne, kvazaŭ ĝi estus mia kredo, pro kio mi kelkfoje malmoderiĝas, sed ĉar mi devas min kelkfoje faligi, tial mi konsolas min per ĉi tiu kredo. Jen, parolu vi, ankaŭ vi havas viajn pensojn.“

„Vi estas prava, min emocias, kion vi diras, kaj tamen devas esti io en ni, kion la malbono ne rajtas tuŝi, kio estas la eterna, absoluta malamiko de malnoblo; Dio ne kuniĝas kun Satano, por triumfi.“

„Povas esti tiel“ diris Ŝolandro kun maltrankvilaj okuloj „sed kiel vi volas savi vin?“

„Per batalo sen fino, kaj se devas esti, senpripense per la morto. Nur en ĉi tiu senco ĝi fariĝos la enirejo al lumo“.

„Kiel vi parolas. Pripensu, ni estas nur homoj.“

„Ĉu nur? Ni estas homoj! Ne ekzistas io pli granda. Ni ne estas ĝi al nia senkulpigo, sed al nia eterna gloro. Kia senkonsidera idealismo, ambicii ion, kio estu staranta pli alta, ol la homo. Celinda povas ĉiam unue nur esti, altenstarigi la homon.“

Ŝolandro rigardis en la malplenon, poste li diris trankvile kaj simple, kiel oni parolas nur el sincera koro:

„Ne forgesu, ke mi estas nur destinita, sed ne elektita.“

Vidante lian mizeran vizaĝon, duone deturnatan, devigis min la esprimo de naiva malĝojo en ĝi al respektplena silento pro lia neevitebla sorto. Mi sentis la absolute certan sincerecon de liaj vortoj kaj ilia humileco profundigis miajn pensojn en la krepuskan sferon de konsoliga antaŭsento. Estis al mi, kvazaŭ tamen devus fine malfermiĝi al ĉi tiu sentimento la

regno de senmakula heleco kaj kvazaŭ, ke tiuj kiuj vere konas la fajron de l'batalo, estus neniam kapablaj fermi la briletantajn pordegojn de ĉi tiu regno.

* * *

Mia konstante kreskanta simpatio por la esenco de Ŝolandro kaj mia emo al li, konstante senripoze influis mian kritikon, kaj miajn konkludojn. Li tute okupis min, kaj mi ne povis liberigi min de la tasko, akomodi min al lia eco kaj lia mondpercepto. Sed tiam mi ne havis ankoraŭ la forton, evoluigi antaŭ mi lian bildon kaj ĝin ĝuste taksi. Hodiaŭ mi scias, ke li devis rezigni la plej altan kontentiĝon, ĉar liaj idealoj kaj pretendoj fariĝis neniam efektivaj faktoroj de lia propra, natura vivo.

Mia embaraso kreskis, kaj mia vivo fariĝis maltrankvila kaj turmentata, jen mi sentis min altirita, jen forpuŝita, kaj mi povis nenium el tiuj situacioj toleri kun konvinkiteco. Okazis el si mem, kaj unu foje mi parolis kun li malkaŝe pri tiuj sentoj, sed lia respondo kontentigis nek lin nek min, ĉar li parolis ĉiam mallerte kaj malcerte, kiam li vidis starigita sin antaŭ iu tasko de pripensado, male konvinkige kaj bone, kiam ia pasia sentfluego malfermis la barilojn de lia brusto. Miaj demandoj turmentis lin, li respondis ilin murmurante aŭ frivole, kaj mi havis la impreson, kvazaŭ li vidus en ili malestimmon, aŭ dubon. „Pensu bone pri mi“ li diris foje kun repaciga rideto, „kaj estu certa, ke mi tia estos. Mi estas ĉiam obeema, al ĉiu iniciato, sed mi ne povas pensi aŭ vivi laŭ fiksa programo.“

Okaze de diferenco inter niaj opinioj li en eksciteco diris vortojn, kiujn mi ne forgesis, kaj kies vereco fariĝis por mi signifa. Mi ŝajnis esti lin riproĉinta, ke la konkludo tirita el iu fakto min ne kontentigas, kaj li respondis mallonge kaj refute:

„Kiu rigardas kaj vidas formon, ties pensoj valoras iom, eĉ se ili sen ĉi tiu stato de bonŝancaj fortoproporcioj ŝajnas malmulton taŭgi. Sed kiu rigardas, kaj nenio fariĝas al li formo, ties pensoj estas malbonaj, eĉ se ili pro ilia ekzakteco elvokas la miron de l'mondo. Mi vidis formojn, amiko, kies brilon kaj majestecon vi ne imagos, sed mi ne havis la kapablon efektivigi, ke ankaŭ aliaj vidu ilin. Tio estas mia fatalo, ĉar mi estis destinita al tio, kaj tial mi nun estas mizera ĉirkaŭpelato. Ho, ne kredu, ke mi ne scias, kio mankas al mi, ke mi ĝin scias, estas mia fiero kaj samtempe la fonto de mia malĝojo, la origino de mia senripozeco, de mia malkontento kaj fine de mia degradiĝo. Mi meritas tion, kio okazas al mi, ne konsideru min aroganta“.

Dum la sekvanta tago mi konstatis, ke la lasta okazintaĵo en la gastejo de Kalaŭer postlasis ombron en la animsento de Ŝolandro. Li povis fali en koleran meditado, kaj batalis ĉagrenite, sed vane kontraŭ la sufero en sia koro, kiun li malrespektis, sed ne povis subigi. Fine eksplodis la kolero:

„Kial interesas vin la aferoj de mia vivo, ke vi enmiksiĝas? Ĉu estas nun pli bone, ke ŝi paŝas kun ĉi tiu knabaĉo tra ĉiu marĉo?“

„Kiu?“ mi demandis mirigite, „pri kio vi parolas?“

„Li eĉ demandas! Ĉu estis mi, kiu ŝin forpelis? Kiun intereson havas por mi la kritiko de aliaj pri ŝi, al mi signifas ion ŝia amo. Ĉu estas ŝia kulpo, ke ŝi ne povas koketi kaj sopiri kiel Margareto aŭ Anjo?“

„Vi parolas pri . . .“

Ĉi tiu fiulo trenas ŝin tra ĉiuj latrinoj de sia malmoralo. Ne domaĝas pro mi! Mi ne povas toleri, ke Jona pereu. . .“

Mi silentis terure ektimigite. Unu momenton mi arde koleriĝis kaj kun subita malprudenta kuraĝo mi estis preta al pasia persvado. Poste mi sentis, kvazaŭ sufiĉus nur incito, ekrigardo, por konduki Ŝolandron al la malo de sia opinio, kvazaŭ devus esti li mem, kiu instruus min kaj sin mem pri

sia danĝera eraro. Sed metiĝis ne videbla mano sur miajn lipojn.

„Neniam“ mi laŭte kriis.

„Kion do, ,neniam?“ Kiu ja volas ion de vi?“

Mi konis lian kapricon, kvankam mi tiam ankoraŭ ne havis la ĝustan ideon pri tio, kia demono en la jaroj de maljuniĝo li povis fariĝi en rilato al virinoj. La longe trouzataj sentimentoj vekigis al furioj kaj ĉiu ekvilibro sufokas en la timego, ke la tempo de ĝuoj povus forpasi, en la teruro pro alproksimiĝanta malpleneco, en kiun ne penetras sono de paciĝo, ĉar la neniam demanditaj spiritoj de la brusto, povantaj savi, perdis sian konsoligan voĉon.

„Kial vi silentas?“ vokis Ŝolandro incitite. „Mi malamas vin en ĉi tiu silento, ĉu vi komprenas, abomena vi estas al mi.“

„Mi ne povas helpi al vi.“

„Ĉu helpi? Kiu petas vian helpon? Vi estas stultulo.“

„Mi timas pro vi, mi estas malĝoja, ĉar mi amas vin.“

„De kiam mi vin konas, forlasis min mia malnova feliĉo, mia lerteco, mia gaja humoro. Vi elŝiris la mortintojn el mia brusto, la torĉojn de l'juneco, de l'malnova tempo, la ĉarmajn vizaĝojn, kiuj jam de longe estis entombigitaj, la vivon, kiun mi perdis. Ĉu vi diras, helpi? Vi puŝas min en la nokton, vi, nur vi!“

Mi estis konsternita, sed kiel mi estus povinta malpermesi al li, ke li elŝutu sur min la surdan koleron de sia malespero? Mi sentis, ke li konas la aliajn flankojn de ĉi tiuj aferoj, kaj mi timis lin eĉ pli inciti, per pli da silento aŭ parolo; tial mi foriris, sed vespere pelis min mia maltrankvileco al Kalaŭer.

Mi venis meze en la tumulton. Jona, kiun mi la unuan ekvidis, staris en akruĝa robo sub la gasflamo, meze en la ejo, hele lumigita en la haladzo kaj fumo de la ĉambro, kaj la vertikale malsuprenfalanta lumo vidigis ŝiajn trajtojn en

malmola, griza koloro kaj en malsimpatia akreco, kiu per la esprimo de timo kaj streĉiteco estis eĉ pligrandigita. La malseka raŭka voĉo de Kalaŭer kriegaĉis kaj falsetis, li forŝovegis kelkajn personojn de la tablo de Ŝolandro, ĉe kiu tiu ĉi staris kontraŭe de la litografiisto, ebrie, sencecse ekscitite kaj tremante kiel incitita kaj katenita besto. La spaco inter la du viroj estis abismo. La klina kaj atenda sinteno de lia kontraŭulo estis nedireble malica, singarda, celkonscia kaj sen videbla eksciteco. La mastro kvietige parolis al Ŝolandro, ŝajnis al mi, ke li volas fini la disputon, kiu certe, kiel ofte pli frue, eksplodis inter ambaŭ, sed en sia mallerteco, en sia kolero li verŝajne uzis vorton, Ŝolandron furiozigan. Ĉar ĉiuj konfuze kriadis, mi nenium komprenis, sed nun subite estiĝis por mallonga momento silento de rigideco; io ne komprenebla, kutimanta enkonduki malbonajn okazaĵojn, haltigis ĉies spiron, kaj sennervigis ĉiun agadforton. Mi antaŭen saltis, flanken puŝis Kalaŭeron kaj kriis la nomon de Ŝolandro, sed jam dum mia energia ekmoviĝo ĝi okazis: Ŝolandro estis antaŭen paŝinta, kriegante pro kolerego, li kaptis la kontraŭulon ĉe l'nuko, kaj mi vidis la gracilan, grizan homon flanken fali en maniero, kvazaŭ li falus kiel ebriulo ĉirkaŭ kolono, de li ĉirkaŭbrakata. Sed ĉi tiu turniĝo havis ian abomenindan flekseblecon, mi komprenis la sencon de ĉi tiu interplektiĝo, antaŭ ol mi estis ĝuste ekkoninta ĝin, samtempe kun ĉiuj miaj sentoj, kaj mi sciis la fakton, vidante Ŝolandron sian kapon levantan, kaj lin kun malferma buŝo, kun profunda sopirego, egale al soifeganto, per vaste malfermitaj, senbrilaj okuloj la plafonon serĉantan.

„Longdaŭra, akra ekkrio malantaŭ mi disŝiris la malĝojan nebulon de nia situacio, ĝi estis Jona. La litografiisto preterrapidegis min kliniĝante, renversante seĝon, faletante, poste ne sin rektigante li malaperis tra la pordo. Ŝolandro premis ambaŭ manojn en la dorson, li antaŭenŝovis la lumbojn, falis krakante sur la genuojn, la supra korpo antaŭenkliniĝis, kaj poste malrapide li malleviĝis flanken. Per tio unu mano senforte antaŭŝoviĝis, kaj mi vidis sur ĝi ruĝan vualon, malsekan

kaj disviŝitan, terurigan pro la malgrandeco de l'makuliĝo, la simbolon de l'fino.

Kiam Ŝolandro min rekonis, li jam batalis kun la morto, la eksplodo de kolerego, kiu lian korpon streĉis, foriĝis en malbenado kaj kriado. La tranĉilo de lia kontraŭulo penetris tra la dorso en la pulmon kaj vundis la koron, tiel, ke liaj spiroj kaj la sekundoj le lia konscio estis mezuritaj.

„Estas la realeco“ li balbutis kun senluma rideto rigardante mian vizaĝon „la ŝanĝkolora fabelo vivo kuŝas flanken, frato. Fariĝis realeco, ĝi trafis min . . . mi nun devas morti. Ĉu vi aŭdas . . . ne, vi ne povas aŭdi ĝin. Kiel strange mi vere min sentas, neniam estis tiel — mi devas morti, vere mi — frato.“

Liaj okuloj plenaj de terura miro alrigardis min rigide kaj fremde. Sed poste ili refoje pleniĝis kun varmo de homeco, kun interesiĝo kaj ĉarma iluzio de l'vivo. Lia eksiĝanta spirito luktis inter la ŝanĝantaj ondoj de estado kaj morto, en la lasta refluo, kaj li diris:

„Mi ne kapablis fari — ĉi tiun unu — sed mi ĝin kredis . . . estu indulgaj pri mi.“

Mi tremis, kiel li, kaj aŭdante liajn vortojn, mi sentis ĉion ĉirkaŭ mi plena de sankteco, mia emocio forigis timon kaj dolorojn, ĉar la lasta vorto de l'mortanto skuis min, kiel nenia vorto ĝis nun. Kvazaŭ lumradio aŭdiĝis la respondo de l'savo: „Hodiaŭ jam vi estos kun mi en la paradizo.“ Mi ne komprenis, kiel ĉi tio okazis, ĉar mi opiniis aŭdi la sonantajn vortojn, sankta antaŭsento tuŝis min, ke tra la limoj de l'konscio, malfermis al mi la amo mallongan enrigardon en la regnon de l'transsubstanciĝo kaj gloriĝo.

La korpo de Ŝolandro terure tremegis, li ĵetis la kapon flanken, spiris multfoje kun raŭka ĝemado kaj mortis.

Post kiam tio estis okazinta, ĉesis la rigideco en mia brusto, ne estis plu la altaĵoj kaj abismoj de lumo kaj mal-lumo, inter kiuj mi senkorpece estadis kun la mortanto, ĝi estis la gastejĉambro, la voĉoj kaj korpoj de homoj, ĝi estis

mi mem kaj la malnova vivo. Sed min atakis, kvazaŭ rabobesto, la turmento de mia kordoloro.

„Mia kara frato!“ Mi levis lian pezan, paliĝintan kapon, premis ĝin sur mian bruston kaj kisis lian buŝon, kies lipoj eligis la lastan varmon, sed jam komencis rigidiĝi; ĉi tiun surteran esprimilon de l'sovaĝa, malĝoja animo, de pasiaj pensoj, de malbenoj kaj nostalgio. Ĝi ne estis deformita kaj la iam bele konturitaj lipoj regajnis en la pala koloro de l'morto siajn ĉastecon, — estis rubo kaj floroj, forlasita batalekampo.

Ni levis la mortinton, por porti lin en la apudan ĉambron. La voĉoj de l'homoj penetris ree kompreneble en miajn orelojn. Oni disputis, kiu estis kulpa. „Oni ne povas akuzi lin, ĉiu vidis, ke li estis atakata.“ La gastĉambro pleniĝis kun homoj, oni sendis al la oficistaro. Maljuna komercaĉanto, de mi konata, tute alproksimiĝis, kaj diris kun iom ridinda soleneco de malnovmoda parolmaniero, uzata de simplaj homoj en momento de kortuŝiteco:

„Ĉi tiu homo eksspiris.“

Li faris krucsignon kaj klinis sin, poste li prenis min ĉe ŝultro kaj alrigardante min, li diris:

„Konsolu vin. Ĉu li estis via patro? Fine ni ĉiuj devas kredi je ĝi, unu tagon ankaŭ nin ĝi trafos“.

Ni metis la korpon de Ŝolandro sur benkon en la apuda ĉambro, la mastro malpermesis al ĉiuj la eniron kaj elŝovis la virojn, kiuj helpis porti. Li mem revenis, kaj ferminte la pordon, li restis dum iom da tempo staranta ĉe mi, skuis senkonsile kaj timplene la kapon, ekmovis ŝultron, levis la manojn, malferminte ilin, kvazaŭ li volus forflugigi birdojn el ili. Post timema rigardo al mi, li eliris.

Post kiam mi estis iom atendanta ĉe la mortinto kaj estis ferminta liajn okulojn, malfermiĝis la pordo de nove kaj mi ekkonis la staturon de l'fratina amikino de Ŝolandro, kovritan per tuko. Ŝi alrigardis min per vaste malfermitaj okuloj, esprimantaj, kvazaŭ ŝi volus atendi. Jen mi komprenis,

ekstaris tuj, por translasi al ŝi la homon de ŝia vivo por la mallonga tempospaco, en kiu ŝi fine apartenis sola al li.

* * *

Kiam mi kelkajn tagojn post ĉi tiu okazintaĵo forlasis la urbon, estis jam aŭtuno, kaj la vasta multkolora ĉirkaŭaĵo prezentiĝis al miaj rigardoj sub la klara ĉielo. Mi aŭskultis ree la sonon de miaj ŝuoj sur la suna sojlo de l'tero, kiu min ankoraŭ portis, en kiun Ŝolandro estis entombigita. La birdoj flugis lumdirekten, suden, kiel en mia spirito la vortoj kaj pensoj de l'mortinto. Ŝajnis al mi, kvazaŭ mia vojo ne kondukus min de ĉi tie tien, ne de unu loko al alia, sed de unu forlasita batalekampo sur alian. Nia tera vivo estas mallonga okazo, fratoj, unu matenhoro.



En la eldonejo de
Paul Knepler (Wallishauszersche Buchhandlung)
Wien, I., Lichtensteg Nr. 1

aperis la bonega lernolibro por germanoj:

Vollständiger Lehrgang der internationalen Hilfssprache

ESPERANTO

von J. Glück und Dr. Edmund Sós

(11.—20. Tausend)



EINIGE URTEILE:

KELKAJ KRITIKOJ:

„Es ist das beliebteste Lehrbuch geworden, dessen sich deutsche Esperantisten bedienen.“ *Mödl. Ztg.*

„ . . . ĝi estas vere bonega.“

Fno. B. (Klosterneuburg).

„ . . . gegen andere Lehrbücher nur zu empfehlen.“

A. S. (Kratzau).

„ . . . daß ich den Aufbau dieses Lehrbuches als sehr gelungen und leicht faßlich bezeichnen kann. *J. K. (Troppau).*

„Mi ĝojas pri la apero de tiel bona lernolibro . . .“

E. Sch. (W.-Meseritsch).

„Wir halten dieses Buch sehr hoch . . .“


Dr. F. S. (Innsbruck).

„Ĉi tiu lernolibro, laŭ mia opinio estas unu el la plej bonaj el ĉiuj kiujn mi konas.“ *Germ. Esp. No. 318-19.*

„Da greift man mit Nutzen zum Lehrgang Gl. u. S. . . . das preiswerte, inhaltsreiche gute Buch.“ *J. Sch. (Wien).*

Książnica Podlaska

im. Ł. Górnickiego w Białymstoku



KP-F14-0000649